6-a Jaro. N-o 283 APERAS  SEMAJNE Leipzig, 6./3. 1930

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Plenum-Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e


ADMINISTREJO: Kolmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerfiner

LONDONO

Kiam oni diras, ke oni estas Londonano, ĉiam eksterlanda K-do montras grandan intereson. La Londonaj SAT-anoj esperas, ke al multaj K-doj estos ebla veni kaj vidi Londonon per propraj okuloj dum aŭgusto 1930. Kion ni povos montri al la kongresanoj?

Unue Londono estas interesa, ĉar ĝi estas *la plej granda urbo* en la mondo; ĝi enhavas 7 ĝis 8 milionojn da loĝantoj kaj 3560 kilometrojn da stratoj. Se oni veturas de l' oriento ĝis okcidento aŭ de nordo ĝis sudo de la urbo per omnibuso, oni vidas nur urbajn stratojn dum trihora vojaĝo, ĉar la distanco estas proksimume 30 km. Cirklo kun diametro de 100 km. entenas Londonon kaj ĉirkaŭantajn urbetojn, kiuj nun estas ĝiaj antaŭurboj.

La urbego estas interesa ankaŭ, ĉar ĝi estas centro de granda kapitalista imperio kaj montras per siaj konstruoj, moroj kaj popolamasoj la luktadon inter la pasinto kaj la estonto. Malnovaj ridindaj kutimoj, kiel ankaŭ la malnovaj konstruoj, ankoraŭ restas ĉi tie. Kaŝitaj per la pli grandaj komercaj konstruoj estas la malnovaj preĝejoj, kaj ne rigardate de la svarmantaj homoj ankoraŭ persistas malnovaj ceremonioj. Unu el la plej ridindaj estas la ŝanĝado de l' gardistoj ekster la Palaco de Sankta Jakobo, kie nun la Konferenco pri mararmiloj okazas. La soldatoj portas altajn ĉapojn el nigra felo, ruĝajn jakojn kaj nigrajn pantalonojn, kiajn ili portis dum la milito kontraŭ Napoleono. La stulto de la militista idearo speguliĝas en la tuta afero. Alia stulta ceremonio okazas, kiam la parlamento komencas labori ĉiujare. Gardistoj, vestitaj laŭ la modo de la tempo de la reĝo Henriko VIII (1509—1547), kiuj ĉiam dejoras ĉe la *Turo* de Londono, iras al la kripto sub la parlamentejo kun lanternoj por serĉi, ĉu nova *Gaj Foks* (Guy Fawkes) metis eksplodaĵojn tie.



Londono: La Turo

La *Turo* de Londono dum la milito estis uzata kiel malliberejo, kaj tie spionoj estis mortpafataj. Nun ĝi nur estas unu el la vidindaĵoj de Londono. Apude oni vidas da Turan Ponton, kiu malfermiĝas kaj suprenleviĝas dum trairo de grandaj ŝipoj. La laboro de elŝipigo de komercaĵoj estas ĉiam tre interesa.


Ĉirkaŭe oni vidas konstruojn de l' granda industrio; ekzemple estas tie la Baltika Domo, Hadzns (Hudsons) Golfa Kompanio, Lojds (Lloyds) ktp. Tute apude estas regiono de domaĉoj kaj tielnomataj "modelaj" loĝejoj, en Oldget (Aldgate), Hebrea kaj alilandula kvartaloj.

Okcidente de Oldget estas la Civito de Londono. Antaŭe Londono estis urbo ĉirkaŭita per muroj, enirebla per pordegoj, kies nomoj ankoraŭ restas. La civito ne estas nur historia unuo, sed ĝi ankoraŭ posedas rajtojn kiel sendependa parto de la grandigita urbo. Ekzemple ĝi havas siajn proprajn policanojn kaj ne devas submetiĝi al reguloj faritaj de la Londona konsilantaro. Ĝi estas regata de la Lord-Urbestro de Londono kaj Konsilantaro. Tiele la potenco forprenita al la reĝo de la burĝoj, ankoraŭ restas en la manoj de la komercistoj de la civito, malpermesante finan unuiĝon en la administrado de la tuta urbo. Simila sendependeco restas je la ĉirkaŭaj distriktoj; do oni povas loĝi en Londono laŭ poŝtoficeja distrikto, sed esti ekster la administra regado de la Londona Konsilantaro. Ĉiu ekstera distrikto havas malsamajn regulojn pri diversaj aferoj, ekzemple la Londona Konsilantaro donas pli da stipendioj por duagrada lernado ol la eksteraj konsilantaroj.

Ĉiam la angloj timas depreni malnovajn privilegiojn. Tial oni ĉie renkontas diverson, kiam bona funkciado postulas unuformecon. Reteno de antaŭaj privilegioj ankaŭ havas bonan flankon, ekzemple la rajto je publika kunveno en diversaj lokoj ĉiam estas forte defendata. La plej konataj kunvenejoj estas Trafalgar-Placo, Hajd (Hyde)-Parko kaj Taŭr(Tower)-Monteto. En Hajd-Parko renkontiĝas procesioj el ĉiuj distriktoj je Unua de Majo. Kaj protestkunvenoj kiel tiuj pri Sako kaj Vanceti okazis tie kaj sur Trafalgar-

La renversiĝo de l' diktatoreco en Hispanio

Primo de Rivera, kies diktatora reĝimo jam plurfoje ŝanceliĝis sub la atakoj de l' sama armeo, kiu ebligis al li la venon al la povo, estas renversita. La malkontento kontraŭ li estis preskaŭ ĝenerala. Li havis kontraŭ si la proletaron, unuan viktimon de daŭra k profunda krizo; plie la etburĝaron, sur kiun ŝarĝiĝis pezaj impostoj, kiu vidis minacata sian ekziston, ĉar la ekonomio komencis koncentriĝi sisteme en la manojn de l' grandaj financistoj k industriistoj. Li havis kontraŭ si ankaŭ la intelektulojn k parton de la armeo. Nur la grandburĝaro subtenis lin, ĉar li aplikis la naci-protektan politikon por ili favoran per doganleĝoj rigoraj, kiuj sekvigis plikariĝon de la vivo, kurzfalon de l' peseto ktp.



Unamuno.

La valuto falis ĉefe sub la premo de l' internacia financistaro, sed ankaŭ pro manko de manlaboristoj k pro la elĉerpiĝo de l' dummilite amasigitaj regnaj monrezervoj. La financa situacio de l' regno estas hodiaŭ mizerega. La diktatoro tamen ne hezitis elspezi multajn milionojn por militmaterialo, militŝiparo k fervojoj, kiuj postulis eksterordinaran buĝeton; al tio aldoniĝis plie la grandaj deficitoj de l' ekspozicioj de Barcelono k Seviljo.

La heredintoj de l' povo provos nun rekonduki Hispanion sur la vojon de normala parlamenta reĝimo. Tio estas paŝo sufiĉe malfacile plenumebla en tiu de Primo kreita fatala situacio. Ĉiuokaze la politikaj cirkonstancoj estigos gravajn k ankaŭ por la proletaro interesajn batalojn. Se komence la tiom mizerege vivaĉantaj proletamasoj en Hispanio estos malkapablaj interveni, ili post kelka tempo estos *devigataj* de la cirkonstancoj ludi sian rolon, rapide spertiĝonte en la politika batalo.

Ni notu dume unu rimarkindan fakton, kiun rezultigis la falo de la diktatoreco: tio estas la permeso por la universitata profesoro *Mikuel de Unamuno* reveni en Hispanion. Kiam tiu scienculo k revoluciema verkisto k filozofo estis ekzilata de Primo, ĉi lasta ne komprenis, kial lia arbitra ago elvokis tioman universalan proteston. Li pensis, ke li povas trakti tiun profesoron same kiel li kutimis trakti ribelemajn artileriajn oficirojn: per enfermo en karcero.

En sia ĉefverko “Vivo de Don Kiĥoto k Sanĥo“ Unamuno argumentas la tezon, ke ne Cervantes kreis Don Kiĥoton, sed male, ke Don Kiĥoto diktis sian historion al Cervantes; ke ne Hispanio faris Unamunon, sed ke Unamuno faras Hispanion. Sekve Hispanio ne estas lia patrino, sed lia filino . . .

Primo, ne povante kompreni la fundon de l' tezo, kondamnis k ekzilis Unamunon simple kiel kontraŭpatrioton, ĉar li ofendis la gloran tradicion de Hispanio. Sed por Unamuno la ekzilo sur dezerta insulo ne estis puno. Ĝi estis por li “oazo en la granda dezerto de l' civilizo“. 6½ jarojn li pasigis ekster Hispanio en ekzilo, k dum tiu tempo li savis la dignon k honeston hispanian. Nun li revenis en tiun landon, por denove akuzi la reĝon k la generalojn . . .

Placo. Inter aliaj interesajoj por SAT-anoj estas la *Brita Muzea Biblioteko,* kie Karlo Marks ĉiutage legis, kaj la tombo de Marks ĉe Hajget (Highate)-tombejo. Sed estas tiom da aliaj interesaj aferoj en Londono, ke estas neeble priskribi eĉ centonon da ili en malgranda artikolo. Do, K-doj, vi devas veni al la Londona SAT-Kongreso en tiu ĉi jaro kaj vidi por vi mem!

C. Osmond (9896).

La raciigita aŭtomobilfabriko (Opel)

La ĉi suba priskribo, verkita de nuntempe ŝipveturanta SAT-ano, havos la specialan intereson de niaj legantoj pro la revoluciaj okazoj en la Opel-fabrikoj de Riselshajm (Rüsselsheim), pri kiuj raportis antaŭ kelkaj tagoj laboristaj gazetoj. Ni jam plurfoje havis okazon atentigi en “S-ulo“, ke tiuj gravaj aŭtomobilfabrikoj en Germanio transiris en usonan gvidadon antaŭ nelonge. Okaze de la striko aktuala montriĝis la forto de l' direkcio en la fakto, ke ĝi estis libera de naciaj antaŭjuĝoj: Usona direkcio, franca milita estraro k germana polico harmonie kunlaboris kontraŭ la laboristoj. Red.

Je la sepa k duono mi ekvidis la fabrikan pordegon, sed terurite mi restis staranta: Granda amaso da senlaboruloj ĉirkaŭis la enirejon. Laŭ mia unua instinkta sento mi volus forkuri, sed mi ekmemoris la vivadon dum la pasintaj semajnoj de vagado. Eble, malgraŭ la granda nombro da aspirantoj, mi ricevus laboron. Do mi atendis kun la aliaj.

Oni malfermis je la oka la kontorpordon k lasis eniri kelkdekon el ni. Mi ne sukcesis la unuan fojon, sed post horo da atendado mi enlasiĝis k etendis al unu el la du oficistoj la legitimajon pri metio k laboro. Demandite pri loĝloko, mi senpripense respondis, ke mi estas sen fiksa loĝejo. La oficisto redonis al mi la paperojn bedaŭrante ne povi dungi min en tiu okazo. Tre flegme mi akceptis ilin k nevidate de li turniĝis al la dua oficisto. Ankaŭ li demandis pri loĝejo k mi senhonte mensogis, ke mi luis ĉambron en la domo de bakisto, en kies butiko mi frumatene estis aĉetinta bulkojn (ĉar mi memoris straton k numeron de la domo). Tio savis min, k mi estis dungata.

Post enregistriĝo en kvar aŭ kvin skribejoj k ekzameno pri la sanstato ĉe kuracisto, ĉio estis fine aranĝita je la dek-sepa, k mi povis sekvantan tagon prezenti min al la majstro en “antaŭaksa konstruejo“.

En angulo de sufiĉe granda maŝinejo staris stablo kun longa vico da enpremiloj. Per la maŝinoj estas farataj akso-partoj, kiujn ni devis munti en la enpremiloj. Ĉiu akso migras de unu premilo al la alia, k en ĉiu enmuntiĝas unu parto. En la lasta ekzemple, la radnaboj surmetiĝis k krome stampiĝis la aksoj per kontinua nombro. Komence mi laŭbezone faris tiun alian manipulon, sed fine mi konstante faris la lastan. Mi do povis konstati, kiom da aksoj muntiĝis potage. En la unua tempo ni faris tridek, k tio konformis al la nombro da aŭtomobiloj fabrikitaj.

Sed la seria produktado de aŭtomobiloj antaŭ nur nelonge komenciĝis en tiu fabriko. Estis intencate pligrandigi la kvanton tiom, ke post unu monato k duono cent po tago estu fabrikotaj. Oni do ĉiutage starigis novajn maŝinojn por torni, frezi, raboti, bori, glatigi la ĉiam pliiĝantan kvanton da partoj. Nur la nombro da enpremiloj ne estis pliigata, ĉar oni jam konstruis alian muntejon, k ĝis ties finkonstruiĝo ni devis per kromlaboro kontentigi la pligrandiĝantan bezonon de muntitaj aksoj. Anstataŭ la tarife fiksita labortempo de 52 horoj ni devis fine labori 60 horojn semajne.

La nova muntejo — t. n. “glitanta rubando“ (“ĉeno“) — pretiĝis por uzado fine de majo, ĝuste kiam komenciĝis la somera varmo. Anstataŭ en la relative malvarmeta angulo ĝi staris meze de la maŝinejo, ĉirkaŭita ĉiuflanke de zumantaj, knarantaj, grincantaj maŝinoj. Ĝi konsistis el senfina relparo, inter kiu glitis veturiletoj, interligitaj per senfina ĉeno, kiu moviĝis per elektromotoro. La apud ĝi staranta kiel unua en la vico levis muntendan akson sur la veturilon, fiksis ĝin per du ŝraŭboj k faris sian

manipulon. Tio daŭris proksimume 10 minutojn, ĉar oni reduktis la nombron da manipuloj al kvar, tiel ke ĉiu el ili daŭris la saman tempon Do post 10 minutoj la motoro ekfunkciis aŭtomate, la veturilo glitis du metrojn for, kie staris la dua. Dum ĉi tiu faris sian laboron, la unua denove levis akson sur la antaŭ li starantan veturilon. La muntado de tuta akso daŭris 40 minutojn. Ĉiu veturilo portis samtempe du aksojn. Staris do je ĉiu flanko de l' rubando 4 muntistoj, k muntiĝis samtempe ĉiam du aksoj. Nia laborejo okupis la trian etaĝon de 4-etaĝa konstruo. Super k sub ni zumis maŝinoj, granda bruo ĉirkaŭis nin, la aero estis saturita de olea haladzo, k temperaturo de 25° C k pli tute ne pliagrabligis la laboron. En tia atmosfero ni devis elteni naŭ horojn. Starante ni faris nian unutonan laboron, k la cirkonstanco, ke ĝuste kontraŭe pendis la kontrolhorloĝo, igis, ke mi malpacience kalkulis ĉiun minuton de l' tago.

—o—

Sed la raciigo konsistas ne nur el la enkonduko de teknikaj novaĵoj, sed ankaŭ el ilia kiel eble plej perfekta eluzo. En pli komprenebla lingvo tio signifas, ke oni elpremas la ekstremon de l' laborforto el la laboristo, devigas lin al plej intensa laboro. De K-do, kiu jam delonge laboris tie, mi eksciis, ke komence la muntado de akso daŭris 90—100 minutojn, nune nur 40. Tio ne sufiĉis al la ĉef-inĝeniero: li postulis plenumon en 20 minutoj, k la majstro, de li instigata, siavice provis rapidigi k peli nin. Li estis ĝentila, eĉ afabla viro, kiu evidente tre kontraŭvole faris tion. Kun sekundhorloĝo en la poŝo li observis nin de malproksime, kaŝe strabante de tempo al tempo sur la horloĝon. Se li vidis, ke ĉiuj ok finis sian laboron en malpli ol 10 minutoj, li nevidate de ni komutis la aŭtomatan funkciigilon de l' motoro, tiel ke de tiam la veturiloj jam post 9-minuta halto ekmoviĝis.

Nesuspektema leganto demandos, kial ni ne laboris kiel eble plej multe por akiri por pli da aksoj pli da salajro? Sed ĝuste tio ne estis, ĉar post ĉiu plimallongigo de bezonata labortempo la popeca prezo estis plimalaltigata. Efektive ni akiris en la unua tempo pli da mono ol nun, kvankam ni nun muntis en sama tempo preskaŭ trioblan kvanton. Ni do neniel profitus farante la manipulon dum 5 minutoj. Tial ni klopodis kontraŭagi la ruzajn atencojn de l' majstro. La tiom malbenita kontrolhorloĝo tiuokaze estis avantaĝo por ni. Laŭ ĝi ni kontrolis la haltotempon de l' glitrubando k konformis nian laboradon al daŭro de 10 minutoj.

Iutage mi kredis rimarki, ke la grupestro trompis nin en la salajr-kalkulado. Mi postulis klarigon de li. Eksplodis pasia disputo, en kiu fine mi minacis lin per peza martelo, kiam li volis forpeli min. Sian minacon denunci la epizodon al la majstro k maldungigi min, ne efektivigis, sed juĝis bona forgesi la aferon. De tiam mi ne plu konstatis "eraron" en la kalkulado.

La firmo enkondukis laŭserian fabrikadon laŭ usona modelo. Sed tiu produktmaniero kondiĉas ekziston de sufiĉa nombro da konsumantoj, kiuj por aŭtoj ne estas ankoraŭ en Germanio. Por laboristo germana eĉ biciklo estas lukso. — Do, je fiksita tempo fabrikiĝis ne cent, sed eĉ cent dek aŭtomobiloj. Sed ... ili ne havis aĉetantojn. La firmo sekve, tre kontraŭvole, devis limigi la produktadon. Iun tagon ni surpriziĝis per afiŝo, ke provizore sabate ne plu estu laborate; baldaŭ ankaŭ la lundo fariĝis libera tago, k kiam ankaŭ tio ne sufiĉis, komenciĝis la maldungoj. Tiel nia laborgrupo tute malaperis: nian laboron (nun nur 15 aksoj tage!) faris kelkaj elektitoj, al kiuj mi — ĉu bedaŭrinde, ĉu feliĉe? — ne apartenis.

Ree mi estis senlabora, sed nun kun la privilegio malsati kun semajna subvencio 10-marka. Mi ĝin rezignis. Mi preferis formigri, kvankam estis pluva septembro. *7548.*

SOCIA VIVO EN AŬSTRIO

Socia asekuro

El la 6 500 000 loĝantoj de Aŭstrio proksimume 4 milionoj ĝuas socian asekuron. Bedaŭrinde la asekuroj ne estas centrigitaj, sed ekzistas apartaj



Monumento al la Respubliko en Vieno

Je memoro de ĝia starigo en nov. 1918. Bustoj (laŭvice) de J. Reuman, V. Adler, F. Hanuŝ.

asekur-institutoj por industriaj laboristoj, oficistoj, agrikulturaj laboristoj k ministoj. La asekuroj por oficistoj eĉ estas dispartigitaj laŭ politikaj tendencoj. Krome ili estas ordigitaj laŭ branĉoj, nome malsano, akcidento, senlaboreco. Ili ne estas unuformaj. Oficistoj havas pensi-asekuron, laboristoj la t. n. maljunul-renton. Hejmlaboristoj nur kontraŭ malsano estas asekuritaj. Aparta asekuro ekzistas por soldatoj k oficiroj. La maljunul-asekuro por laboristoj jam estas decidita de la parlamento, sed ankoraŭ ne validas. Intertempe maljunaj laboristoj ricevas monhelpon de 50 ŝil.[1] monate sub la titolo de maljunul-prizorgo. Kelkaj asekuroj ampleksas ankaŭ la familiajn membrojn de l' asekurato.

La asekur-kotizoj por laboristo, kiu meznombre perlaboras 50 ŝil. (= 7,50 dol.) semajne, sumiĝas je 6½ ŝil., do 13% de la salajro. De tiu sumo pagas $^2/_5$ la entreprenisto, $^3/_5$ la laboristo. Por oficisto kun laŭmeza salajro de 300 ŝil. (= 45 dol.) monate, estas pagendaj 15% kiel kotizo (inkluzive pensi-asekuro), po duono de la dunganto k dungato.

[1] 1 aŭstra ŝilingo = ĉ. 0,15 dol. usona.

En la jaro 1928 oni nombris 1 150 000 malsan-kazojn kun sume 20 milionoj da malsan-tagoj. Meznombre oni kalkulas 10 malsantagojn jare por ĉiu asekurato. Akcidenton suferis 35 mil laboristoj; el ili 12 mil restis invalidaj. Al 40 mil personoj estis pagata la maljunul-rento. Estis elspezataj:

milionoj da ŝilingoj	
193	el la malsanul-asekuro
110	„ „ akcident-asekuro
26	„ „ maljunul-asekuro
sume 329 milionoj da ŝilingoj	

La kostoj por la administrado estas 10% de la enspezoj.

La kapitalistoj senĉese plendas pri la "sociaj ŝarĝoj", ĉar ili ankaŭ devas kontribui al la asekur-kotizoj. Ili tute ne konsideras, ke en Aŭstrio dum 1928 estis elspezataj 340 milionoj da ŝilingoj por fum-materialo. Sed ĉu ne estas pli grave certigi la ekzistadon de laborantaj homoj?

La senlaboreco

Lasttempe en Aŭstrio la senlaboreco rapide kreskis. En decembro 1929 oni nombris 190 000 senlaborulojn, en januaro 1930 jam 250 000 k komence de februaro 330 000, t. e. ĉ. 30% de ĉiuj laboristoj aŭstriaj. La lasta cifero eĉ superas la senlaborulan nombron en 1919, post mondmilito k revolucio, en tempo de ekonomia malbonstato. Kalkulitaj estas nur tiuj, kiuj ankoraŭ ricevas la ŝtatan monhelpon, fakte la nombro de senlaboruloj estas eĉ pli granda.

La kaŭzo de tiu grandega senlaboreco parte estas la krima agitaĉado de la faŝistoj, kiuj dum aŭtuno de la pasinta jaro intencis starigi diktatorecon. Kvankam ili malsukcesis, la konstantaj minacoj k provokoj timigis la eksterlandon, kiu perdis la fidon al Aŭstrio, ĉar oni atendis civilan militon. La ŝparuloj elprenis la monon el la bankoj k ŝanĝis ĝin en aliajn valutojn. El eksterlando ne plu venis mendoj, la mastrumado forte ekskuiĝis.

Krome la senlaboreco estas pligrand-

igita per tio, ke la entreprenistoj maldungas laboristojn k anstataŭ ili dungas faŝistojn, kiuj kontentiĝas per malpli alta salajro. En la provinco oni treege persekutas la laboristojn; se iu agas en socialista partio, li tuj estas maldungata. Demokratio laŭ imago de la kapitalistoj!

Sendube la senlaboreco ankoraŭ estus pli granda, se la komunumo de Vieno ne perus laboron per konstruado de loĝdomoj. Ankaŭ la komunumo garantias por la kredit-liveradoj de la aŭstria maŝin- k metal-industrio al Sovetio k per tio ebligas komercajn rilatojn je utilo de la laboristoj en ambaŭ landoj.

Ĉio ĉi ne plaĉas al la burĝa klaso k ne malhelpas insultojn kontraŭ la malamataj "marksistoj", kiuj administras la "Ruĝan Vienon". Kaj la registaro? Ĝi dekretas, decidas, deklaras, promesas ion fari por la senlaboruloj — sed nenio okazas. La potenculoj havas aliajn zorgojn. Antaŭ nelonge oni reenkondukis la iaman monarĥan himnon en la respubliko Aŭstrio . . .

F. S., Vieno.

Pri laboristaj salajroj kaj milit-elspezoj en Ĉeĥoslovakio

Pri la salajroj de la laboristoj en Ĉeĥoslovakio estas publikigataj nur tre maloftaj raportoj, k nur per nia "bonega" soci-asekuro oni povas fari al si imagon pri la vivnivelo de tiulanda laboristaro. Tiaj raportoj jam sufiĉas por montri, ke la bataloj de la laboristoj por pli altaj salajroj estas tute pravaj. Sekvantaj nombroj por la jaro 1928:

Klaso	Salajroj ĝis	Asekuritaj laboristoj
1	6 kr. ĉ.[1] tage	216 125
2	10 „ „ „	334 152
3	14 „ „ „	482 353
4	18 „ „ „	307 092
5	22 „ „ „	281 409
6	25 „ „ „	208 055
7	28 „ „ „	138 951
8	31 „ „ „	121 812
9	34 „ „ „	96 596
10 pli ol	34,5 „ „	301 727

Estas do memkompreneble, ke nur malgranda parto de la laboristaro atingis normalan vivnivelon, ĉar 34 kronoj ĉeĥaj tage ankoraŭ ne signifas atingon de l' necesa vivnivelo por la laboristo en Ĉeĥoslovakio.

Sed la ĉeĥoslovaka respubliko havas sufiĉe da mono por la bezonoj de polico k ĝendarmaro, por militistaro k militaj celoj. Ĝi elspezas por tio jare 2491 milionojn da kronoj. En la ĉeĥa militindustrio estas okupataj 70 mil laboristoj, k Ĉeĥoslovakio liveras militmaterialon al Rumanio, Polio, Litovio, Jugoslavio k Estonio. Oni konstruas en apudaj landoj grandajn armilfabrikojn. Ĉeĥoslovakio havas konstantan armeon el 150 mil soldatoj. Oni ankaŭ preparas leĝon por antaŭ-militserva eduko de ĉiuj junuloj 18-jaraj. Se komenciĝos milito, oni povas devigi ĉiujn homojn, de malgranda infano ĝis maljunulino, fari militservon. Vere tre taŭga leĝo por ŝirmi la "sanktajn rajtojn" de la nacio k de la ŝtato.

Johannesberg, 13 648.

[1] Unu ĉeĥa kr. = ĉ. 0.03 dol. usona.

ATEISTOJ SENDIULOJ LIBERPENSULOJ

certe abonos senprokraste al

SENNACIECA PEDAGOGIA REVUO

ekscinte, ke en tiu dumonata 32-paĝa ilustrita revuo aperas konstanta rubriko pri ateisma edukado en lernejo. La jara abonprezo estas **nur ½ dolaro** jare aŭ egalvaloro.

Abonojn sendu al Adm. de SAT, Colmstrasse 1, *Leipzig O 27*. Sovetianoj abonu senpere ĉe CK SEU, *Moskvo*.

La urbo Berdiĉev — simbolo de hebrea "bohemvivo"

Kiam iu elparolas la nomon de l' urbo Berdiĉev, oni povas tuj memori pri tiu negranda urbo kiel fajrujo de juda malveremo k trompemo-friponeco; unuvorte plej grava centro k sidloko de tielnomata "getto". Jes, tio estis urbo Berdiĉev antaŭ la Oktobra revolucio. Nun ĝi tre aliformiĝis, nuntempe la urbo, kie iam fianĉiĝis la eminenta franca literaturisto Onore' Balzak (Honoré Balsac) aspektas kiel distrikta urbo de Kieva gubernio. La urbo mem aperis ĉirkaŭ la XII. jarcento k disvolviĝis iom post iom kiel unu el la gravaj industri-komercaj lokoj de l' iama Ruslando. La urbo troviĝas sur estinta k estonta vojo al Litovio, Polio, Kiev — Nigra Maro. Ĉiuj punktoj kruciĝas kun Berdiĉev. Krome ĝi kunligas tiajn gravajn fervoj-nodpunktojn kiel Berdiĉev-Kasatin-Kiev-Leningrad k antaŭe Kiev-Povno-Brest-Varsovio, nun Kasatin-Berdiĉev-Zdolbunovo.

En tiaj grandaj interdependoj Berdiĉev kreskis k kreskadas laŭ sia

KULTURTASKOJ

M. Krjukov

(4-a daŭrigo. Vidu n-ojn 279/82)

5. En mezursistemoj

5. 1. Tempon k angulojn ni mezuras per 60-uma sistemo, pecojn ni kalkulas per dekduoj, mezuriloj niaj ĝis nun prezentas ĥaoson da sistemoj, kiuj tre malhelpas kalkulojn, ĉar tute ne konformas al ĉefe uzata dekuma sistemo. Tial nia tasko estas akceli unuigon k dekonigon de ĉiuj mezursistemoj por ke ili poste, en Novo, per sola revolucia ago (dekreto) facile estu 24-onigitaj aŭ 30-onigitaj. La Novo havos pli intensan k ampleksan vivon k tial postulos la pli potencan nombradsistemon (24-uman, se ne 30-uman), kiu krom tio estos pli oportuna, ĉar dividiĝos per 2, 3, 4, 6, 8, 12, ne sole per 2 k 5.

5. 2. Uzi nur sennaciecan metran sistemon celante samtempe lingvan ordon k ekonomion k evitante superfluajn mezurradikojn (similajn al la kriplajoj *deci, centi*). Multaj el mezurilnomoj povas esti derivitaj per reguloj de nia lingvo: *0,1 m = dekonmetro* (ne kripligita *decimetro), 0,01 = centonmetro, 0,001 = milonmetro... 10 m = metrodeko, 100 m = metrocento, 1000 m = metromilo.* Same pri gramoj.

5. 3. Temperaturon montri nur per la skalo de science uzata centoniga termometro de *Celsio*, neniam per naciaj *Farenhajt k Reomur.*

5. 4. Tempon montri per plenaj horoj k horonoj kalkulante de 1 ĝis 24 por tuta tagnokto. Ekz. 17 1/5 h. montras la kvinan horon k 12 minutojn post tagmezo. Neniu horloĝisto fabrikos konformajn ciferplatojn sen via antaŭa aspiro k postulo.

5. 5. Ne uzi senordan k ĥaosan tempon de lokaj meridianoj. Uzi tempon de 24 horzonoj. Tuta terglobo por ĉi tiu celo dividiĝas per 24 meridianoj en 24 sektorojn aŭ zonojn similajn al oranĝsegmentoj. Ĉiu horzono longas de poluso al poluso k larĝas (paralele al ekvatoro) 15 gradojn. La internacie uzata meridiano de *Grinuiĉ* iras tra la mezo de l' nula zono. La nulan zonon apudas oriente la unua k okcidente la 23-a. Tempo de 2 najbaraj zonoj kondiĉe diferencas inter si ĝuste je unu plena, senminuta sen-ona horo. Kaj diferenco inter tempoj de via horzono k tiu de Grinuiĉ ĝuste k ĉiam montras numeron de via horzono. Ĉiu mondano por esti sendependa de ŝtataj k geografiaj limoj apartenu al tiu zono, kies tempon li uzas. Por precizigi la situon en norda aŭ suda parto de l' tero, al cifero de la zono oni povas aldoni la literojn *n* aŭ *s* (vidu karton en nia jarlibro).

5. 6. Nuna kultura homo la tempon mezuras laŭ suniro, ne laŭ fazoj de luno kiel niaj praulojpaŝtistoj. *Tial la monato k semajno jam delonge fariĝis prahistoriaĵoj,* kiuj maldekonigas la tempkalkulon k pro superflue uzataj terminoj (januaro, februaro . . . dimanĉo, lundo, mardo . . . vendredo, sabato k. m. a.) malutile balastigas la homvortaron k kaŭzas malŝparon da lingva energio. Ni propagandu jenan revolucian kalendaron:

skalo. Ĝi nun havas pli ol 60 mil loĝantojn, kelkajn negrandajn bonarangitajn stratojn kiel tiujn je nomo de K. Libkneĥt, Sverdlov k. a. En korto de estinta kapitalisto Rabuŝinski troviĝas nun pensiono por studentoj de vespera laborista universitato. En malnova palaco de "dvorjan"[1] nun — distrikta konsilejo de profesiaj unuiĝoj, en angla klubo — bone starigita Muzeo de Revolucio. Urbon de friponoj, noblaj komercistoj k aliaj personoj de facila profitakiro nuntempe ne plu prezentas Berdiĉev. Ĉion posedas la kooperacio (C. R. K., Centra Laborista Kooperativo); ĝi havas pli ol 150 fakojn. Kooperacio bone funkcias; ĝi konstruadas multajn palacojn por laborista bezono. Ekzistas multnombraj lernejoj, pli ol dektri 7-klasaj, 3 prof. lernejoj, unu agronoma teknikumo por hebreoj. Por maturaj laboristoj ekzistas 3 vesperlernejoj, lab. fako por preparo al universitato (ruse VUZ).

Kompreneble, kiel malnova urbo, Berdiĉev havas tre interesan historian karmelitan monaĥejon, kun grandaj, larĝaj niĉoj en siaj vastaj brikaj muroj. Iam en mezepokaj tempoj monaĥoj defendis sin kontraŭ invadoj de diversaj sovaĝaj popoloj. Troviĝas malnova katedralo kun siaj historiajoj, kun multaj subdomoj k keloj, trapasintaj la urbon. Tre impone aspektas novkonstruita monumento al Lenin sur grava strato — Libkneĥt. En centro k ĉirkaŭoj troviĝas multaj fabrikoj: 2 sukerfabrikoj, leda fabriko, plej granda por tuta Sovetio, nome "Spartak", dua leda fabriko, maŝinkonstrua manufakturo, multetaĝa muelejo. Krom tiaj grandaj entreprenoj ekzistas malgrandaj kiel brikfabriko, farb- k gluaĵ-fabrikoj ktp. Ĝenerale la urbo kun la tempo aliformiĝas, pli k pli akceptas la aspekton de granda industria centro en Ukrainio.

Vald. St. Fedorovski, Kasatin (13 059).

[1] Prireligia klaso en estinta Rusio, komparebla al "per-oj" en Anglio.



TAGO EL MIA VIVO

Mi estas popoljuĝisto. Jen mi sidas en mia ĉambro en Popoljuĝejo k trarigardas la paperojn kun petoj k deklaroj. Mi prenas unu post la alia, legas k metas la rezoluciojn. Jen granda papero, kiu estas skribita laŭ formo k ordo per granda facillegebla skribmaniero. Al ĝi estas almetita listo da havaĵo, k la petanto petas disigi lin de sia patro, kiu estas kamparano, k la filo ne volas loĝi kune kun li. Mi legas, trarigardas la liston k rimarkas jenan havaĵon: 5 ikonoj (statuoj de sanktuloj), skribtablo, bufedo, granda spegulo ktp. Mi pensas: "Kiu do estas lia patro? Ĉu li estas simpla kamparano? — Ne povas esti. Mi pli atente legas k tuj ekmemoras... Ho, ja lia patro estas la paroĥestro de granda preĝejo en Krasni Ĥolm!" Jen, prenu tiun "kamparanon"! Mi komencas pensi pluen: Por kiu celo lia filo volas disiĝi de sia patro? Kaj mi ekmemoras, ke lia filo estas studento de Leningrada Industria Instituto. Nu, nun por mi estas tute klare. Lia filo lernas en altlernejo, k por ke oni ne konsideru lin kiel filon de pastro, li ekvolis fariĝi "kamparano". Sed mi ja estas popoljuĝisto k scias, ke multaj gefiloj de laboristoj k veraj kamparanoj ne povas lerni pro manko de loko. Sed tiu "kamparano" sukcesis enŝovi sin en altlernejo. Mi devas fari, por ke li estu forpelita. Kaj mi faras.

Jen — dua papereto. Ĝi estas malgranda, malpura k estas skribita per simpla krajono, per malfacile legeblaj literoj. El ĝi mi ekkonas, ke hejmlaboristino petas sian salajron de sia mastro, kiu dungis ŝin por 5 monatoj kontraŭ 10 rubloj monate. Sed ŝi laboris dum 7 monatoj k ricevis nur 30 rublojn k estis forpelita... kun ido. La papereto estas subskribita: "pro analfabeteco de petantino, laŭ ŝia peto subskribis Ivanova." Nu, ĉi tie mi ekvidis aron da krimoj de la mastro; mi tuj aranĝas la rezolucion, por ke la juĝesploristo rapide faru la esploron k transdonu la mastron al popoljuĝo.

Mi ne ankoraŭ sukcesis finskribi, kiam mi ekaŭdis, ke frapas iu kontraŭ la pordon. Mi ekkrias: — Eniru!

La pordo malfermiĝas k envenas iu homo. Li ĉirkaŭrigardas k demandas: "Ĉu mi povas intime paroli kun vi, ĉu neniu subaŭskultos min?

Mi trankviligas lin, sidigas k diras: "Kion vi volas, K-do? Vi estu kvieta k rakontu al mi la tuton."

Li sidiĝas k komencas rakonti: Li estas vilaĝkorespondanto k verkas malgrandajn, sed akrajn artikoletojn por distrikta ĵurnalo. Li skribis pri drinkado de lokaj estroj, pri ŝtelado de kooperativa mono, pri malŝparo de mono, kiu estis kolektita de kamparanaro por konstrui la malsanulejon ktp., k lia inkognito depost nun estas malfermita. Kontraŭ li prezidanto de l' soveto — "subkulako" (kulako = grandkamparano), sekretario de l' soveto — filo de l' pastro k kelkaj kulakoj nun deklaris la venĝon. Ili volas mortigi lin. Ili jam provis fari

---

Anstataŭ 12 monatoj la jaron dividi nur en 4 sezonojn (printempo, somero, aŭtuno, vintro) po 90 tagoj en ĉiu. La mankaj 5—6 tagoj aldonataj al fino de ĉiu jaro inter vintro k printempo estu ekstersezonaj tagoj de seninterrompa ripozo por homo k por maŝinoj. Same tagoj de ripozo povas esti unuaj kelktagoj de ĉiu sezono k ĉiu tago, kies cifero finiĝas per 5 k per nulo[1]. Nunaj Pasko, Karnavalo, Kristnasko fakte estas tiaj sezonfestoj nur iom senorde metitaj k religie nebulitaj. Ĉi tiuj festoj okazas po kvaronjare post aŭ antaŭ sezonaj laboroj de agristoj k tial ne povas malhelpi ilin. Burĝa kutimo senorde meti festotagojn dediĉitajn al delonge pasintaj datoj, sanktuloj aŭ famuloj (eĉ revoluciaj) ne havas rilaton al racie konstruita kalendaro, ĉar senordigas tempkalkulon k ritmon de laboro. La jaroj, kies ciferoj finiĝas per 5 aŭ per unu nulo, ricevu po unu supertago. Kiuj finiĝas per 25, per 50, per 75 aŭ per du nuloj, ricevu po du supertagoj. Kiuj finiĝas per 500, ricevu po 3 tagoj. Jaro komenciĝu de printempa tagnoktegalo (nuna 22. de marto). Tempaĝo komenciĝu de l' unua jaro de ĝia enkonduko por esti sennacia k sentendenca. Tagnokto komenciĝu matene (en la nuna 6-a), kiam komenciĝas laboro k tagvivo, ne meznokte. Estus pli bone, se tago k nokto havu po 10 (aŭ po 20) horoj k konforme duoncirklo havu 100 (aŭ 200) gradojn.

5. 7. En ĉiutagaj rilatoj dekutimiĝi de uzo de mezepokaj k tute ne internaciaj religiaj datoj — Pasko, Pentekosto, Kristnasko ktp.

5. *8.* Por komparceloj anstataŭ ŝanĝemaj prezoj en nacia mono uzi valoron de unu gramo da oro 0,999-e pura. Por trovi valoron de iu nacimone esprimita sumo komparu ĝin kun same esprimita prezo de unu tia orgramo. La vendoprezon de oro skrupule oficialan k milmilone precizan en ajna momento povas doni al vi ajna banko. Ekz. 25 832 rubloj valoras ĝuste 20 000 orgramojn, se en la sama tempo vi sciiĝas per banko, ke unu orgramo prezas 1,2916 rublojn (25 832 : 1,2916 = 20 000). Oro estas egalkutima k egalvalora en ĉiuj landoj de l' mondo. Ĝia valoro pro maŝinigo de orricevo (k pro tio, ke oro en uzo preskaŭ ne konsumiĝas k orprovizo de l' mondo pli k pli grandiĝas) iom post iom falas[1]. Sed ĝi falas egale en ĉiuj landoj. Tial orgram' estas en nunaj cirkonstancoj plej bona komparilo k diversnaciaj frankoj, belgoj, ŝilingoj, eĉ "internaciaj" spesoj[2] fariĝas superfluaj. Laborhoro ne taŭgas por ĉi tiu celo, dum ekzistas ega diferenco inter premo sur koloniajn k nekoloniajn laboristojn k dum ekzistas diferenco inter malsame privilegiataj specoj de laboro, k t. n. NEP en Sovetio.

(Daŭrigota.)

[1] Ĝi ebligas transiron al 5-taga semajno bezonega por fari la produktadon seninterrompa.

[1] Dum la lastaj jardekoj ĝia valoro falis je ĉ. 30%. Tial ĝia industrio iom malgrandiĝis k vivo pli k pli "kariĝas".

[2] De esp-istoj antaŭ la milito kreita monunuo, kiu praktike neniam ludis konsiderindan rolon. — *Red.*

tion k iutage li estis vundita per tranĉilo. Tion ĉi oni faris nokte, kiam li revenis de kunveno. Sed li forkuris. Tamen ... La homo prenis sian kapon per manoj k eksilentis ...

— Kio okazis kun vi, K-do? Trankviliĝu!

— Pri kio mi rakontis? demandis mia vizitanto. — Jen, vidu, K-do juĝisto, post tiu okazo mi komencis timi ... Mi ne scias, kio fariĝas kun mi, sed ... sed mi timas ... Kaj jen mi tute forgesis ... kion do mi rakontis?

— K-do, trankviliĝu. Ĉi tie estas nenia danĝero por vi. Vi devas rakonti ĉion; k mi helpos.

— Alian tagon, kiam mi sidis apud la fenestro, iu ĵetis kontraŭ min ŝtonon. Mi saltis el mia kabano, sed mi ne povis vidi. La nokto estis senluna. Iu forkuris ... K-do juĝisto, kion fari al mi? Mi estas terurita. Mi timas loĝi en la vilaĝo. Mi petas vian helpon. — Kaj li ekploris.

Post kiam li trankviliĝis, li rakontis, ke la soveto estas jam reelektita, ke jam fariĝas la juĝesploro pro monmalŝparo k aliaj krimoj de eks-estraro de l' vilaĝo, sed, malgraŭ tio, ili ja estas liberaj k li timas loĝi k verki.

Mi tuj telefonis al la prokuroro, rakontis al li la kazon k ricevis la permeson por aresti la krimulojn. Mi ordonis al la miliciestro k li plenumis tion. Jam estas la dekunua horo. Mi devas iri popoljuĝ-kunsidon. Jam venis du popolkunsidantoj, k la juĝsalono estas plena je publiko. Komenciĝas tago ordinara el mia vivo.

A. S. Nikitin (12 408), Sovetio.

La sento pri l' relativo naskiĝas de l' studo pri moralo kaj fariĝas necesa de nun en la esploro pri solvoj. *J. W.*

El la franclingva anarkistema gazeto "Plus Loin" (Pli Malproksimen).

DISKUTEJO

PRI MORALO

Laŭ la aĝoj

Se oni studas la konduton de l' individuoj en la infangrupoj lasitaj al si mem k sin dediĉantaj al agoj, kiuj ilin interesas, kiel la ludo, oni rimarkas fortajn diferencojn en diversaj aĝoŝtupoj. Ĝis tri, kvar jaroj la infanoj, kiuj ludas, nur okupas sin pri si mem; ne ekzistas rilat-interŝanĝo kun la kamaradoj. Estas la individuismo, sen ludregulo. La kato ŝajnas al mi havi ekzakte tiun ĉi spiritostaton. De kvar ĝis sep, ok jaroj, ekzistas en la infankolektivo egocentrismo[1]; oni akceptas multajn regulojn, sed por si mem, k oni ne atentas, ĉu la kunludanto aplikas la saman regulon. De ok ĝis dek unu jaroj, komenciĝas kunagado. Oni provas interkonsenti kun aliaj, unuigi la regulojn. En okazo de malsamo oni interdisputas brue momenton, tiam oni akordiĝas. Ĉirkaŭ dek unu, dek du jaroj, la reguloj akceptas fundamentan valoron, ili estas netuŝeblaj, oni ne diskutas pri ili, ili estas kodigitaj. Se oni fondas societon, la celo estas baldaŭ forperdita el vido, dum la elekto de l' estraro k la verkado de l' statuto havas esencan valoron. Ekzistas ĝenerala intereso por la regulo en si. Ĉirkaŭ dek kvin ĝis dek ok jaroj, la zorgoj plilarĝiĝas, oni rimarkas, ke la reguloj, kiujn oni kredis absolutaj, estas iom aliaj. Oni ekkaptas tion, kio estas da relativo en la leĝo, oni serĉas eĉ adapti la regulojn al novaj ludkondiĉoj. Kaj iuj sukcesas havi pli da respekto por la vivo ol por la reguloj. Tio karakterizas la plenaĝulojn.

Alivorte: por la etuloj la kondiĉoj de l' regulo ne estas fiksaj, dum la respekto por la regulo estas absoluta; por la aĝaj, la regulo povas ŝanĝiĝi, sed kiam ĝi unu fojon estas akceptita, estas demando pri konfido k sendanĝereco, observi ĝian aplikiĝon.

Certe ekzistas paralelismo inter la diversaj stadioj de l' ĝentileco en la infansocietoj k la ŝtuparo de l' moralvaloroj en la diversaj homaj socioj. Sed kio komplikas ankoraŭ la vivon de l' kolektivoj k konservas ian specon de ĥaoso, estas ke meze de tiuj ĉi kolektivoj mem, troviĝas individuoj kun diferencaj niveloj de civitaneca disvolviĝo. Unuj kondutas kiel tiranoj, aliaj havas sklavan spiritostaton; unuj estas puraj individuistoj, aliaj male havas stulte imiteman spiriton ŝtatoficistan. Unuj estas primitivuloj kun venĝ-instinktoj, aliaj montras sin bonvolemaj k toleremaj, dum ioma nombro fine interakordigas la respektivajn rajtojn de l' personeco k de l' kolektivo, la iniciativon k la amasspiriton.

Konsiderante tiel akre kontrastajn elementojn, kie la divido en ekspluatantojn k ekspluatatojn estas nur unu el la aspektoj, oni ne vidas, ke reĝimo kun unueca aŭ ekstrema principo povus estigi ekvilibron, kiu kontentigus almenaŭ la plimulton da homoj, mi volas diri la rojalismo, la katolikismo, la bolŝevismo, la individuisma anarkismo, la unueca sindikatismo, la liberalismo el Manĉestro, la faŝismo. La simpligitaj formuloj ne plu speguIas en la 20-a jarcento la multflankecon de l' temperamentoj k bezonoj.

[1] Tendenco fari el si mem la centron de l' universo. — *Red.*

9-a vol. Serio· Scienco.
Biblioteko de Sennaciulo

REVOLUCIO EN LA LINGVOSCIENCO

Jafetida lingvoteorio de akademiano N. Marr. Skizo de A. P. Andreev. 68 paĝoj. — Prezo: **0,60 mk. g.**

Mendu tuj ĉe Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27, Germanio. Sovetiianoj mendu rekte ĉe CK SEU, Poŝtkesto 630, Moskvo.

Pri la moralo de l'vegetarismo

Ne estante kontraŭulo de l' vegetarismo nek kompetentulo pri la doktrino, mi tamen volas atentigi onin pri kelkio, tute netuŝita de la diskutintoj pri la temo.

Ĉu *fakte* iu ajn homo povas vivadi, mortigante neniun animalon?

— Se oni estus eĉ la plej sincera k rigora vegetarano, oni ne povus konsekvence sekvi la principojn de l' nemortigo, ĉar, krom la relative grandaj animaloj, ekzistas animaloj malgrandaj k eĉ nevideblaj por la okulo (insektoj, mikroskopaj animaloj), kiujn oni mortigas grandanombre ĉe ĉiu paŝo, faro aŭ eĉ spiro.

Vere, oni povas spitdiri min, ke tiaspeca mortigo estas neevitebla, k la vegetaranoj eĉ mikroskopajn animalojn ne mortigas *intence por ilin manĝi.* Ĝi estas vero ... tamen *la fakto* de l' animalmortigo restas ...

Plie. Ĉu efektive la principoj de l' vegetarismo havas *altan moralvaloron?* Mi sincere dubas! Ja pasis jam la tempo, kiam la vegetaĵoj estis konsiderataj kiel nevivaĵoj. Ili kreskas, multobliĝas, spiras, sin nutras, malsanas, — do *ili vivas.* Ne malmultas eĉ scienculoj, kiuj opinias, ke la vegetaĵoj sentas la doloron ... Do, mi tre hezitus solvi, kio estas pli deca de l' morala vidpunkto: mortigi beston, kiu iel povas sin defendi aŭ forkuri, aŭ vegetaĵon, kiu estas tute sendefenda k neforkur-kapabla? ...

Plej morale estus, se oni sin nutrus per neorganikaĵoj. Tamen ekzistas sedoj: 1. Oni ne solvis ankoraŭ la problemon de l' ĥemia nutrado k 2. la sciencaj esploroj iom post iom jam forviŝas la limlinion inter la neorganikaĵoj k organikaĵoj ... Do, homo profunde esploranta la problemon, ne povas sincere motivi la vegetarismon per *moralaj konsideroj.*

Kelkaj scienculoj diras, ke la vegeta nutrado estas pli utila por la sano, k mia propra sperto devigas min konsenti kun ilia opinio. Sed tia motivigo de l' vegetarismo estas *ne morala, sed higiena.* Tamen, oni devas konsenti, ke *praktika* akcepto de l' vegetarismo, tiele motivita, ne ĉiam k ne ĉie estas ebla. Oni ekpensu pri la loĝantoj de l' ekstrema nordo, kie tute aŭ preskaŭe malestas kreskaĵoj — k mia eldiro ne ŝajnos senargumenta.

Do, oni ne diru, ke la vegetarismon postulas la proleta moralo. Decokaze oni povas nur diri, ke la veget-manĝado estas utila por la sano ... en la lokoj, kie la greno, fruktoj k legomoj estas sufiĉe malkaraj.

N. S. Pargaĉevski (11 746), 9-a horzono.

Esperanto-Servo

N-o 23 — 4-a jaro Gvidanto k kompilanto: O. BÄSSLER, Ebermayer-Str. 8, I, Leipzig C 1 (Germ.) 6. Marto 1930

EL SOVETIO

La soveta "Ford"

158 (Esp.-Servo.) Kelkajn kilometrojn malproksime de urbo Niĵnij-Novgorod, kie la rivero Oka eniras la riveron Volga, ankoraŭ hieraŭ estis nur kampoj, kiujn plugis kamparanoj. Kaj hodiaŭ — ĉi-tie estas grandega konstruaĵo de soveta "Ford", soveta aŭtogiganto. Oni festas novan venkon de la soveta industrio. La 1. 2. 1930, post plej impona, grandega amas-kunveno oni distranĉis la skarlatan start-rubandon, kiu havis jenan surskribon: "sur socialistaj radoj, sur socialistaj reloj, antaŭen al socialismo!" Eksonis muziko k la dek unuaj sovet-aŭtomobiloj ekveturis por prova veturo. Vespere ili revenis, la prova veturo finiĝis. La 1. 2. estis festo de nova k granda venko je fronto de nia socialista konstruado. La fabriko plen-funkcios la 1-an de julio 1931. En la fabriko poste estos produktataj 140 000 aŭtomobiloj ĉiujare, k ili estos tute el soveta materialo. Por loĝigi la 45 000 laboristojn, kiuj laboros en tiu nova fabriko, oni konstruas tute novan urbon. Post finkonstruo de ĉi-tiu fabriko Niĵnij-Novgorod estos la 4-a, laŭ grandeco, industria centro en la Sovetunio.

Babinĉuk (15 028), Odessa.

EL ĈEĤOSLOVAKIO

Loĝeja mizero — preĝeja konstruo

159 (Esp.-Servo.) Multaj familioj en Ĉeĥoslovakio estas sen loĝejo, ĉar ili ne povas pagi la altajn lu-prezojn; kostas unu ĉambro 200—250 k. ĉ., du ĉambroj 300—350 k. ĉ. po monato (1 dolaro = k. ĉ. 33.—). Sed aliflanke la klerikularo baldaŭ komencos konstrui novan preĝejon en la urbo Gablonz a./N. sur placo, kie pli bone aspektus laborista hejmo. Por sociaj aferoj la burĝaro k eklezio ne havas monon, apenaŭ š a j n a n intereson. Ĉeftasko ilia estas, nebuligi la spiriton de la popolo, pro kio certe urĝas konstruo de nova preĝejo. Bedaŭrinde ankaŭ la liberpensula movado estas ne sufiĉe forta, kvankam ĝi meritus pli da subteno . . .

8889, Reinowitz.

Unumana proleto devis helpi

160 (Esp.-Servo.) Sur la fiŝ-lageto en urbo Prostejov (Moravio) rompiĝis la glacio k kelke da lernantoj komencis droni. El ne malproksima maltejo vidis tion unumana laboristo, Josefo Formanek. Li ne sciis tuj, pri kio temas, sed vidis sur akvo-barilo, ke cent sanaj homoj senhelpe kuradis k kriadis. Rapide li alkuris k saltis sur la malfortan glacion, kiu rompiĝis, k li komencis serĉi en la malvarma akvo la infanojn. Li eltiris ĉiujn 4 dronintajn knabojn. Tri el ili estis ankoraŭ vivaj, la kvara jam mortis. Poste li simple reiris al laboro, k nur helpe de polico oni trovis lin k dankis per mondonacoj, i. a. de la respublika prezidanto, kiu donacis honore 5000 kronojn.

J. V. (13 935), Stonavo.

EL SVISIO

En Ĝenevo kiel ĉie!

161 (Esp.-Servo.) Lastan someron, sub gvidado de la sindikatoj de lignajistoj k masonistoj, la tiufakaj laboristoj strikis dum kvin semajnoj. La celo de tiu striko estis, ricevo de labor-kontrakto, enhavanta regularigon de laborhoroj (48 h. po semajno k libera post-tagmezo sabata) k plialtigo de pohora salajro je 0.10 sv. fr. por ĉiuj lignaĵistoj. La entreprenistoj provokis tiun strikon, rifuzante diskuton pri kontrakto. Sekve de tio la sindikato decidis ekstriki, kun aprobo de ĉiuj laboristoj. La striko estis bone gvidata k fine la entreprenistoj subskribis la kontrakton k konsentis al la plialtigo de la salajroj. Tamen ĉiun sabatan posttagmezon laboristoj laboris en konstruejoj (ĉefe fremdaj lab. ne sciantaj francan lingvon), parte, ĉar ili timis forpelon, parte pro profitemo. La sindikato decidis malhelpi tion, tiucele ĝi kreis ligon por kontraŭago. Do nun ĉiun posttagmezon dum sabatoj liganoj vizitis konstruejojn k maldungis la maldungindajn laboristojn (?). Kompreneble tiu agado kaŭzis renkontojn inter liganoj k policistoj. En konstruejo de nova stacidomo (Kornavin, Ĝenevo) masonistoj laboris posttagmeze dum sabato sen neceso. La liganoj alvenis k intencis klarigi al ili, kial ili ne laboru. Sed ankaŭ alvenis policistoj, kiuj provis malhelpi eniron de liganoj. Tiuj tamen sukcesis k du el ili estis sur ŝtupetaro, kiam la entreprenisto venis k intencis faligi ilin; aliaj liganoj tion malebligis. La entreprenisto akceptis ilin per pugnobatoj k grave vundis unu el ili. La liganoj kompreneble defendis sin k la policistoj, vidante la situacion por la entreprenisto, intervenis k penis forpeli la liganojn aŭ aresti ilin. Sed la liganoj, subtenitaj de homamaso, kiu dume kolektiĝis, foriris nur, kiam la laborantaj laboristoj estis maldungitaj. Poste la liganoj vizitis aliajn konstruejojn. Nun la afero venis antaŭ polictribunalo; la entreprenisto plendis pro malhelpo ĉe laboro, la laboristoj pro batoj k vundigoj. Oni ankoraŭ ne juĝis, sed eble la entreprenisto ne gajnos, ĉar li havas kontraŭ si sian propran subskribon sur kontrakto. — Estas fakto inter aliaj, kiu demonstras, ke klasbatalo estas ĉie realo k ne revo de revoluciuloj.

H. V. (15 209), Genevo.

EL POLIO

La nesatigeblaj kapitalistoj

162 (Esp.-Servo.) Jam de ses semajnoj strikas la koton-laboristoj en Lodz, kiuj ne permesas depreni kvindek elcentojn (!) de siaj mizeraj salajroj. La kapitalistoj, vidante la senlaborecon en la urbo, eluzas tion por plie ekspluati la laboristojn k sin pli-riĉigi. Sed la laboristoj en tiu metio estas bone organizitaj k certe batalos ĝis finvenko.

Rob. Oel.

Ankoraŭ du profunuiĝoj fermitaj

163 (Esp.-Servo.) Antaŭ kelka tempo, kiel raportite en E. S., oni fermis la tajloran k komercoficistan unuiĝojn; sed tio ankoraŭ ne estas fino. Antaŭ tri semajnoj faŝista polico enpenetris kun multaj fi-agentoj en la unuiĝojn de teks- k konstrulaboristoj (ili havis komunan ejon). Traserĉinte ĉion, oni fermis la ejon de ambaŭ unuiĝoj k arestis sesdek Gek-dojn . . .

Rob. Oel.

El urb-ministrejo por socia protekto

164 (Esp.-Servo.) En la urb-ministrejon venis senlaborulo, kiu jam ne ricevis monhelpon k postulis tagmanĝkuponojn. En la oficejo oni respondis al li, ke oni devas plenumi antaŭe ĉiujn formalaĵojn, sed dume li devis malsati. Kiam la formalaĵoj jam estis en ordo, li venis por akcepti la kuponojn, sed ricevis respondon, ke li venu venontan semajnon! Je fiksita dato li venis malsata k postulis la tagmanĝkuponojn. Tiam la oficisto respondis al li (jam la trian fojon) ke li devas atendi ankoraŭ kelkan tempon. La senlaborulo komencis krii, ke li estas malsata k jam ne povas pli longe atendi. Nun la oficisto postulis, ke li tuj forlasu la oficejon! La oficisto vokis policiston, kiu arestis la "skandal-farinton". Antaŭ semajno okazis la juĝo k li estis kondamnita al unu jaro da malliberejo . . .

Rob. Oel.

Kondamnita pro senhonorigo de kruco

165 (Esp.-Servo.) La gvidanto de malsanul-kaso en Starachowice (Staraĥovice), Edward Kaca, ordonis al gardisto Kmieĉ (Kmiecj) forigi krucojn, kiuj troviĝis en la salonoj. Kmieĉ forigis la krucojn. Malsanuloj raportis pri tio al kuracistoj. Kaŭze de tio policisto arestis Kaca pro malhonorigo de krucoj, kiujn li metis en kamereton troviĝanta en proksimo de porkstalo. La juĝistaro en Ostrowiec (Ostroviec) kondamnis la arestiton al $1\frac{1}{2}$ jaroj da malliberejo.

C. G.

Korekto de la raporto 113 de E. S. La persono, kiu ĵetis ŝtonojn k rompis fenestrovitrajojn ĉe vendejo de la ĉeĥoslovaka ŝufirmao "Bata" en Lodz, estis speciale dungita de ŝu-magazenistoj. La laboristoj batalas por plialtigo de siaj salajroj kontraŭ *ĉiuj* entreprenistoj . . .

SENNACIULA SCIENC-KULTURA PAĜO

N-o 24 Sub la kontrolo de Scienc-Kultura (Akademia) Sekcio de SAT. Redakci-adreso: Dim. Snejko, Minsk, Poŝtkesto 33 (Sovetio) N-o 24

DE LA REDAKCIO

Materialo por la Paĝo alvenas. Sed tre multaj K-doj tute forgesas, ke por nia Paĝo oni donas nur solan paĝon en "S-ulo". Ofte alvenas artikoloj, kiuj postulas 2 ĝis 3 pĝ. por unu artikolo. Certe tiu materialo aŭ estas severe mallongigata, aŭ kuŝas en redakcio ĝis la aŭtoro sendos pli mallongan artikolon. Ni ankoraŭfoje atentigas ĉiujn kunlaborantojn: Skribu tre koncize, malpli da vortoj, pli da senco. Mallongaj artikoloj pli baldaŭ trovos lokon sur la paĝoj de "S-ulo".

La tutsovetia medicina esperanta sekcio ĉe SEU volas aranĝi dum la X. SAT-Kongreso sekci-kunsidon de kuracistoj k partopreni en Internacia Laborista Universitato per medicinaj raportoj. TEMS turnas sin pere de nia Paĝo al ĉiuj SAT-medicinistoj, ke ili deklaru sian partoprenon en la aranĝota kunsido, k al ĉiuj SAT-anoj kun la peto anonci pri la temoj dezirataj por Int. Lab. Universitato. Skribu aŭ al sekcio: Leningrad, Inĝenernaja 9 "Dom Medrabotnika", al TEMS ĉe CK SEU, aŭ al nia redakcio. *Red.*

SOVETA MEDICINO DUM 12 JAROJ[1]

Kio rilatas al ĝeneral-saniga organizo, ĝin Soveta Respubliko kiel heredajon de malnova reĝimo, krom grandega malsaneco k morteco, transprenis en tre malbona stato. Konstruita je klasa principo, la saniga organizo de cara tempo en sia pli kvalifikita parto estis kreita por riĉuloj. Por laboristoj k kamparanoj estis organizitaj kuracistaj "regionoj" k kuracisthelpantaj "punktoj". Kiel rezulto de imperialisma milito, eĉ tiu ĉi sanig-aparato estis en duondetruita stato. Multaj kuracistaj regionoj estis likviditaj, multaj anstataŭigitaj per kuracisthelpantaj "punktoj". La civila milito k la blokado tre malbone speguliĝis en la stato de saniga afero. Kun tia duondetruita sanig-aparato Soveta Respubliko enpaŝis la periodon de epidemio k malsato, kiam grandega malsaneco de l' loĝantaro direktis multe pli altajn postulojn al ĉi tiu aparato. Ĝis la jaro 1923 la saniga reto ne estis firma en sia disvolviĝo, kvankam en tiu ĉi tempo ĝi jam estis pli granda ol en la jaro 1913. Malsanulejaj litoj plimultiĝis je 5,3%, kuracistaj regionoj je 362%, proporcio de loĝantaro po 1 lito estis malgrandigita je 17,7%, po kuracista regiono — je 37,3%. Poste, pro vico da rimedoj k fortikigo de financa bazo de sangardo, la saniga reto, tute aparte en vilaĝaj lokoj, komencas malrapide, sed nedeklinite kreski, k depost 1925 de jaro al jaro montras sufiĉe rapidan kreskon. Tiel, en 1926 kompare kun 1925, pligrandiĝis nombro da kuracistaj regionoj je 22,3% k litoj en ili je 32%. Dum 1927/28 lita reto atingis en urboj de USSR — 141 600, kio konsistigas meze unu liton por 204 homoj de urbaj loĝantoj k en vilaĝaj lokoj — 58 000. Signifoplene altiĝas ankaŭ kvalifikado de saniga helpo. Nombro da medicinaj laborantoj k aparte kuracistoj, kiuj oficas en organizo de saniga gardo, ĉiujare kreskas. Tiel, dum 1925/26 en tuta USSR oficis 40 937 kuracistoj, sed en 1927/28 — 53 000. Por perfektigi la sciencojn de la kuracistoj ekzistas specialaj kursoj ĉe institutoj.

Ne malpli karaj k gravaj atingoj de Soveta potenco estas konstateblaj ankaŭ rilate al banlokoj. Dum la cara reĝimo banlokoj por laboristo k vilaĝano estis absolute neatingeblaj; la caraj banlokoj priservis negrandan tavolon da riĉaj homoj k ofte servis ne kiel loko por kuracado, sed por amuziĝo. Soveta potenco larĝe malfermis pordojn de la banlokoj por laborula loĝantaro. Banloka helpo kun ĉiu jaro fariĝas unu el la plej gravaj kuracsanitaraj rimedoj.

Resumante disvolviĝon de l' afero de saniga gardo en USSR dum 12 jaroj, oni devas konstati, ke malfacila k senfine peza estis la vojo de Soveta medicino dum tiu ĉi periodo. La imperialisma milito subfosis bazojn de ekonomia k sanitara stato de l' loĝantaro. La civila milito alportis grandegan disvolviĝon de epidemioj. La blokado ankaŭ malhelpis al provizado je kuraciloj. La malsato ankoraŭ pli multe malfirmigis sanon de l' loĝantaro. Tre malfacilaj taskoj staras antaŭ la Soveta medicino. Ankoraŭ multe da mankoj ekzistas en ĝia laboro; tamen ni havas ankaŭ ne malmulte da atingoj. Nur Soveta medicino povis garantii por laboruloj tiajn specojn de medicina helpo, pri kiuj ili ne povis eĉ revi dum la cara reĝimo. Ĝi laŭfakte, sed ne per vortoj efektivigis sian devizon: "Gardo de la sano de l' laboruloj estas afero de la laboruloj mem".

D-ro A. Karanoviĉ.

El la rusa trad. F. A. Filipov (10 618).

[1] Fino. Vidu n-on 277, pĝ. 196.

NIA POŜTO

13 607. — Provu mallongigi vian artik., aŭ ni tion faros mem.

2800. — Kiam kolektiĝos pli da ehoj pri tiu temo, ni uzos viajn informojn por konigi ilin al la leg., sed vi malpravas. Gripo estas infekto-malsano. Mikroboj de influenco k aliaj bakterioj (pneŭmokokoj, streptokokoj) kaŭzas ĝin. Via rimedo — havas neniun influon je la malsano. Baldaŭa resaniĝo en via kazo estis aŭ pro "facila" formo de gripo aŭ pro stato de l' malsanulo. Daŭrigu kunlaboradon.

Al Studentoj. — Atentu enpreson de viaj artikoloj en "Sennac. Pedag. Revuo", TEPS k nacilingvaj lab. studentaj organoj.

ĈU FUMI?

Respondo de fumanto

Hezitante mi ankoraŭ staras antaŭ la tendo de miaj obstinaj, malcedemaj tabakkontraŭuloj. Nia afabla redaktoro permesis al la gefumantaro aŭdigi sian opinion pri la ĝenerala tabakkonsumado. K-do *Doks* pravege notis en "S-ulo" n-o 269 la ĝis epidemio kreskintan tabakfumadon regantan en ĉiuj landoj, sendiference de sekso k aĝo. Oni rajtas supozi, ke fakte *la plejmulto el la fumantoj ĝis nun ne konsciiĝis, kial ili fariĝis viktimoj de diablo — "tabako".*

Unue ni konsideru la pratempan tradicion, kiam inter sovaĝuloj la tabako estis konsumata je plej stranga maniero. Due: Ni konsideru la tempon kiam la fumado publike severe estis malpermesita al tiuj, kiuj ne apartenis al nobelaro k al la cetera aristokratio. La tradicio lukti por samaj rajtoj certe estas pramalnova. Fumantoj, kiuj fumis publike, eĉ estis punataj severe per monpuno aŭ aliel. Konata proverbo ja diras: Malpermesitaj fruktoj gustas plej dolĉe. Estiĝis la imitemo, per kiu la fumantoj celis esti taksataj kiel noblaj aŭ kleraj homoj! Iom post iom la tabako fariĝis posedaĵo de ĉiuj popoloj. Kio komence estis nur imitemo, baldaŭ fariĝis ne plu rezignebla ĝurimedo. (Ĉu vere? Red.) La tabako enpenetris la tutan organismon.

Ĉu vi rememoras la tempon, kiam vi eĉ ne estis kapabla kuri memstare, k vi jam ricevis de viaj gepatroj belaspektajn ĉokoladajn cigarojn aŭ cigaredojn? Malmultaj eĉ hodiaŭ imagas, ke tiu ĉi aĝo estis la kaŭzo por fariĝi nesavebla fumanto. Ĉu vi forgesis la stratbuban aĝon, kiam vi kune kun viaj amikoj plej kaŝe malantaŭ fermitaj dompordoj ekfumis la unuan cigaredon? Ĉu ne ridis eble viaj pli aĝaj kunuloj, kiam la larmoj rulfalis de sur viaj vangoj? Ĉu vi ne estis fiera, povante rakonti al viaj intimaj amikoj: "Mi fumis hodiaŭ la unuan cigaredon"? Plenaĝecon oni pruvis al gekonatoj k speciale al eksaj malamikoj, per vaporanta cigaredo, cigaro aŭ pipo! Karaj iamaj frontanojtranĉefratoj! Ĉu vi rememoras la momentojn, kiam ni multope komune, avide fumis unu solan cigaredon? Ĝi fakte kelkfoje pli bongustis ol la enhavo de fera viandujo. Mondmilito tre pligrandigis la nombron da gefumantoj. — Kriantaj reklammetodoj,

TRA ESPERANTIO

ĈU VI FARAS TRADUKOJN?

Tute prave k trafe agas tiuj K-doj, kiuj klopodas enpresigi artikolojn tradukitajn ĉu el "S-ulo", ĉu el aliaj SAT-gazetoj, en ĵurnaloj k revuoj nacilingvaj. Tio estas unu el la rimedoj, por servigi nian lingvon, nian aparaton al la laboristaj amasoj, ankaŭ por atentigi ilin pri la valoro de esp-o. Do ne necesas insisti pri la neceso k gravo de tia laboro. Sed pri ĝia plenumo teknika necesas diri nepre kelkajn vortojn.

Kiel tradukas niaj K-doj? Kiu tradukas? Ĉu ĉiu estas kapabla fari tiun delikatan laboron? Laŭ kolektitaj spertoj ni respondas malkaŝe: Ne! Ne ĉiu taŭgas por plenumi tiaspecan laboron en kontentiga maniero. Kutime eĉ en grandaj rondoj troviĝas nur kelkaj malmultaj K-doj, kiuj vere kapablas k tial estas destinitaj fari tradukojn el esp-o en nacian lingvon. La aliaj detenu sin entrepreni tiun laboron, ĉar ili ne sufiĉe scipovas eĉ sian propran denaskan nacian lingvon! Mi ne volas diri, ke ili ne scias gramatike korekte skribi la tradukitan tekston k ankaŭ laŭ la vortaro, kiun ili zorge aplikis, tre fidele speguli la ideon prezentitan en la originalo. Sed ho ve, unu grava manko frapas la okulon: La stilo estas kripla, k tial la tuto aspektas fuŝa! La fervora tradukinto tradukis tro laŭlitere. Li estis malliberulo, kiu ne sukcesis liberiĝi de la originala lingvo-strukturo esp-a. Li forgesis, ke nacia lingvo posedas sian propran, apartan stilon k ritmon de l' frazoj. Li kredeble depost sia knaba aĝo, sur lerneja benko, ne plu literaturis en sia nacia lingvo.

Tiel okazas, ke ĉe la redakcio ni ricevas specimenojn de tradukoj, pri kies enmeto en gazeto fare de iu redaktoro ni miras. En tiaj tradukoj la *esp-a* stilo estas tute konservita (esp-o ja estas vivanta lingvo kun nur al ĝi propraj apartajoj!); nur la vortoj estas tradukitaj k vicigitaj, dum pri la same necesa stila transformo la tradukinto eĉ ne sonĝis.

Povas esti, ke la laboristaj legantoj de tiaj gazetoj ne postulas pli bonstile verkitan literaturon. Sed eble estas iuj inter ili, kiuj skuas la kapon k ricevas tre malfavoran impreson pri tia fuŝverkado, eĉ kulpigas pro tiuj mankoj la neperfekton de l' lingvo esp-o. Tial niaj K-doj devas ege atenti pri la

NUR 150 ABONANTOJ
mankas ankoraŭ por ĝisatingi la nombron
4000!

Kiu havigos al "S-ulo" la 4000-an abonanton?



Gek-doj, ne haltu nun,
ne laciĝu en via varbado!
Ni estas sur la bona vojo!

kvalito de l' tradukoj, antaŭ ol liveri ilin al la redakcioj de l' nacilingvaj gazetoj. Prefere ili lasu la tradukadon al kompetentuloj en okazo, se ili sentas sin tro malfortaj por plenumi tiun taskon.

Sed ankaŭ inverse validas la samo. Ankaŭ tradukoj el nacia lingvo en esp-on devas esti farataj kun plej granda zorgemo k konscienca atento, ne nur por ne falsi la sencon, sed ankaŭ por eviti nacilingvajn idiomajojn k nacilingvan stilon. Se ni ne atentas pri tio, la legado fariĝas peniga por ĉiuj esp-istoj, kiuj ne scias la nacilingvon de l' tradukinto. Ni povus liveri sufiĉe da ekzemploj pri tio...

Tial: for nacian pensmanieron k nacilingvajn idiomajojn ĉe traduko en esp-on! Kaj batalu ni, por ke baldaŭ venu la tempo, kiam tradukoj el esp-o nacilingven ne plu necesiĝos. Ni alcelu, ke per tia teda, temporaba laboro ne plu bezonu okupi sin proletoj, kiuj havas pli gravajn taskojn plenumendajn ol konservi en sia cerbo la scipovon de kontraŭbatalendaj naciaj lingvoj!

N. B.

FOR ĈIAN BLUFON!

Ni ricevis jenan leteron:

"Estimataj kamaradoj!

Leginte en 'S-ulo' n-o 275 la artikolon de K-do Ivnickij pri esperantista traktoro, ni treege miris, tial ke ni neniam aŭdis pri tiu afero, nek konas la priparolitan K-don Koppel.

Ni tamen enketis pri la afero por akiri certon. La rezulto de nia enketo estas, ke la artikolo aperinta en nia gazeto estas tute fantazia. Sekve ni protestas kontraŭ la enmeto de tiaj blufaj artikoloj, kiuj tro parencas kun la agitecaj, kiuj aperas en partiaj gazetoj. 'S-ulo' estu nepre fidinda organo kaj se iafoje aperas kiel distrilo fantaziajoj, ili estu tiel prezentataj, ke neniu inteligenta leganto povu dubi pri ties fantazieco.

For ĉian blufon!"

77, 1365, 4325, 13 477, 13 429, 11 662.

La tekniko bezonas esperanton

En germana teknika gazeto iu diplominĝeniero Garte (Garthe) priparolas la inventon de nova skribmaŝino, kiu tuj skribe reproduktas la parolitan vorton. La ĉefan rolon en tiu ĉi aparato ludas mikrofono. Oni parolas en mikrofonon k la ekscitita elektra fluo atingas trans plifortigilo nombron da malgrandaj mikrofonoj kun membranoj el diversaj metaloj, kiuj ĝin transigas al leviloj de skribmaŝino.

La verkinto de l' artikolo jene juĝas pri la uzebleco de tiu invento: "La neperfekto k la kuriozajoj de niaj kutimaj kulturlingvoj kontraŭstarigas diversajn malfacilojn al la utiligeblo de tiu ĉi tele-elektro-presilo. Dua inventisto, okupanta sin pri la sama problemo, montras prave al tiu ĉi cirkonstanco k diras, ke neebla estas la reprodukto en dialektformo, ĉar la parolanto estas devigita al klara prononco. Ekzemple estas preskaŭ neimageblaj diktajoj en angla, franca, holanda, rusa aŭ alia lingvo. Oni devus uzi kiel ĝeneralan komprenigilon la mondlingvon esperanto, kies simpla k klara fonetiko taŭgas bonege por la supre citita celo."

H. Jacob, Berlin (7614).

---

kelkfoje eĉ petantaj, allogas nun siajn viktimojn. Kiu scipovas kontraŭstari? Fumanto ja anticipe ĝuas spirite la aromon de sia elektita multŝatata cigaro aŭ cigaredo. Ĉu ni nur estas aŭtomatoj? Ŝajnas, ke jes! Multe da homoj imagas helpe de "forta volo" dekutimiĝi de fumado. *Ĉu vi ne kelkfoje konstatis tute kontraŭon?* Aŭ — se vi ĉesas fumi cigaredojn, vi tamen post mallonga tempo denove fumas, eĉ pli multe ol antaŭe!

Ni permesu la parolon al niaj karaj ne-fumantoj, kiuj eble disponas alian, pli efikan rimedon, baziĝantan sur psikologia vidpunkto. En la nomo de la gefumantoj mi petas vin, mildigu vian skabenan verdikton. *Ripetu vi, karaj tabakkontraŭuloj, viajn instigojn!* Eble iuj estos al vi dankemaj. Povas esti, ke aro da fumantoj deturnos sin de la vojo, kiu estas haladzumata de tabaka fumo. Ĝi ja certe ne helpos al iu.

Bluetaj nubetoj ĉirkaŭflugas mian kapon, ili karesas min kvazaŭ dirante: Ne forjetu min pli frue ĝis mi estos ekbruliginta viajn fingrojn!

Anub (3789).

Treege mallongiginte la artikolon, mi donis voĉon al fumanto por pruvi senbazan k aŭtomatecan venenigon de organismo per fumado. Kiel bone diris Anub: Oni fumas nur pro kutimo k ne povas dekutimiĝi. Batalante por nova homo, por nova sociordo, ni devas pliakrigi la batalon kontraŭ fumado.

Doks.

Pri skribado de propraj nomoj

Ofte oni provis en nia gazeto traduki lingvosonojn, precipe ĉe propraj nomoj, pere de la esperanta alfabeto. Vane! Neniam ni sukcesos aperigi antaŭ la orelojn la ĝustan elparoladon de ekz. la angla vorto: "Campaign", aŭ la franca: "Campagne", tradukante ĝin laŭ esp. maniero, t. e.: *Kempejn* k *Kampanj'*.

Se la unua transskribo ne sonas tro malbone por angla orelo, oni ne povas diri la samon pri la dua, kiu malagrable frapas francan orelon. Kaj tiel ni donos al la leganto nur falsan elparolon de naciaj vortoj neniel utilan al li. Kion do fari? Ĉu ni devos kontentiĝi nur uzi la nacian ortografion? Estus vere ironio, se la homoj, sukcesintaj renversi la lingvobaron, estus haltigitaj antaŭ la malsameco de la homaj gorĝoj, k ne povus perlitere esprimi ties diversajn sonojn! Feliĉe en la praktiko jam de kelka tempo ekzistas rimedo, kiujn multaj ankoraŭ ne konas. Temas pri la alfabeto elpensita de la "Internacia Fonetika Asocio". Ĉi tiu alfabeto konsistas el signoj parte similaj al latina alfabeto, parte tute diferencaj. Ĉiu signo reprezentas vokalan sonon aŭ konsonantan valoron. Al tiu, kiu konas la signojn, facila estas la kompreno de l' elparolo de iu ajn vorto transskribita laŭ tiu metodo, kiel por muzikisto estas la kompreno de muzikaĵo per notoj.

Ĉu ne estus dezirinde, ke ni esp-istoj lernu tiun ĉi vere utilan alfabeton? Mi submetas la ideon al la legantaro, kiu estas juĝanto en la afero.

J. Coignard (9763), Versailles.

FOR INDIVIDUISMON

Plej ofte individua, pure amatora korespondado de esp-istoj ne alportas deziratan efikon, ĉar pri la korespondado neniu alia aŭdas. Kutime korespondanto, ricevinte leteron, tralegas ĝin, verkas respondon, notas sur koverto "respondita" k ĉio estas finita: letero trafas sur sian lokon en albumo aŭ arkivo.

Ĉu la korespondado utilas, ĉu ĝi donas progresadon k aŭtoritaton al esp-o, kiu estas ĉefa "kulpulo" de la korespondado? Bedaŭrinde ne. La K-do ne sukcesas, forgesas aŭ simple ne volas la ĉefaĵon: esp-o devas esti utiligata por servo al tutmonda proletaro k samtempe la utiligo de la lingvo devas doni al esp-o mem triumfon.

Pripensu, karaj individuoj: ĉu vi ricevas ion realan, krom via propra plezuro, per via korespondado? Do, ĝusta solvo de la demando estas: *Kolektiva korespondado.* Por ties efektivigo instigu lokajn kolektivojn, organizojn, ekkoni la neceson starigi internacian korespondadon, prenu sur vin taskon esti peranto de iu kolektivo en rilatoj eventualaj kun eksterlando. Disvastigu pli larĝe ricevitajn leterojn: per gazetaro, murgazetoj, laŭtlegado ktp. Havu nepre interligon kun loka redaktejo: ja altan gravon prezentas apero de iu letero en gazetaro, garantiante la plifortigon de jam komencita korespondado.

Kolektivaj leteroj devas esti verkataj en nomo de kolektivo; pli taŭgas almeti stampojn k kelkajn subskribojn. Ni ne bezonas multnombrajn kolektivojn por starigi la korespondadon. Ĉiu rondeto, lernejo, komitato, grupo, ĉiu eta kolektivo havas en korespondado pli bonajn avantaĝojn ol iu individuo.

Ni lernu pensi kolektive, ni kolektive deĉifru ĉiun ricevitan leteron kolektive forsendu respondojn k demandojn al niaj eksterlandaj amikoj. Do, for malutilan individuismon en internacia laboro, vivu progresema kolektivismo.

Erjuĥin, A. (9 682), Arĥangelsk.

MALGRANDAJ NOTOJ

Al la 8-a de marto

Karaj K-dinoj tutmondaj, proletaj virinoj, kiuj bone scias, kio estas *laboro,* mi salutas vin pro la 8-a de marto, ĉar tio estas nia festo. Virinoj similantaj belajn pupojn, virinoj kun "belfaritaj" vizaĝoj k manflegado — for de niaj vicoj! La 8-a de marto estas la festo de vekiĝanta homara dignosento de virinoj. La 8-an de marto la virinoj devas laŭte diri:

"Ni ne volas esti enmurigataj en la nepenetrebla famili-muro! Ni volas partopreni en socia vivo, ni volas konstrui novan mondon por nova virino."

Aktivulinoj ĉiulandaj, unuiĝu, serĉu novajn vojojn por aliigi la virinajn vivkondiĉojn, k ne forgesu pri la fortega ilo por la tutmonda unuiĝo — pri esperanto! *14 225, Zinovjevsk, Sov.*

Socialisma konkurado

Laŭ alvoko k propono de K-doj Bässler k Tilin interligi sovetiajn Ge-k-dojn kun germaniaj, mi sentas min devigata fari interligon precipe inter prol. virinoj (ĝis 1. majo). La virinmovado estas ankoraŭ tiom malforta, almenaŭ en la Rur(Ruhr)-regiono, ke ĝi bezonas profundan prilaboron. Por daŭrigo mi alvokas jenajn K-dinojn: *Essen,* Muskat-Weingarten; *Dortmund,* Falkenherr; *Herne.* Mende; *Recklinghausen,* Zwolenski. *E. Buchholz (9274).*

Subtenante la utilan proponon de K-do Dereguzov (n-o 279) mi promesas plimultigi la kvanton da abonantoj al "S-ulo" je ne malpli ol 10 dum 6 monatoj (1. 3. ĝis 1. 9.), k krome, se eble, kolekti novan lernant-grupon, almenaŭ savi kontraŭ disfalo la nun de mi depost 3 monatoj gvidatan grupon; ĉar tiucelaj provoj de miaj antaŭuloj estis malprosperaj. Kiu sekvos?!

J. Jefremov, Tula, Sovetio.

Nordĉinia Esp. Junulara Konfederacio

estas la titolo de nove fondita anarkista junular-organizo en Ĉinio, kiu estas starigita sur la bazo de reciproka apogo k solidaro. La organizo havas bibliotekon tamen ne ankoraŭ sufiĉe ampleksan. Ĝi ankaŭ eldonas semajnan gazeton nomatan JUNULARO por la politika batalo. Ĝi petas helpon de l' tutmonda K-daro per alsendo de broŝuroj k periodaĵoj. Subtenu la ĉinian junularmovadon! Korespond-adreso: K-do Ĥ. Ĉ. Maŭ, *Tientsin,* Nankai Universitato, Ĉinio.

Laborista Interligo en Blankrusio

Okaze de sia 5-jara jubileo la Blankrusia Interlig-Oficejo aperigis pli ol 50-paĝan raporton pri sia agado. En la tago de l' sovetia gazetaro (5. V.) la Oficejo malfermos ekspozicion, kiu ankaŭ montros pri- k per-esperantan materialon (Eksterl. gazetoj, kiuj aplikas esp-on, Kiel esp-istoj klarigas veron pri Sovetio, Esp-o je la servo de lab. organizoj, Esp. Lab. Gazetaro, Esp-o k IRH, Radio, Naturamikoj, Fotoamatoroj ktp.). Pri kunlaboro al tiu ekspozicio petas la organizantoj. La materialo estas rekompencota. Adr.: *Minsk,* Poŝtkesto 33. Al OFILI-SEU (Sovetio). *D. Snejko.*

TRA LA MOVADO

(Kroniko)

ĈEĤOSLOVAKIO. Stonava. En tiu vilaĝo malfermiĝas jam nova, dua kurso kun 10 p. Gvidas K-do Bredura. Sekci-kunveno lab. esp-ista 16. II. kun 10 p. (13 935). — *FINNLANDO.* Ĉe la membroj de la ĵus fondita Lab. Turista Unuiĝo (*H. T. Matkailija-yhdistys*) en *Tampere* oni fondis lernogrupon por esp-o. La kurso komenciĝis 21. I. kun 15 p. Instruado okazas laŭ "Petro". Kunvenoj ĉiumarde. Ĉi-jara kongreso de Finnl. LEA okazos dum pentekosto en Tampere. (5095). — *FRANCIO. Parizo.* La ĝenerala kunveno de la loka grupo okazis 17. II. kun ĉ. 50 p. La morala raporto estis aŭskultata, pridiskutata k aprobata. La estraro estis nov-elektata. Daŭras monkolekto por aĉeti lumbildaparaton (por fiksbildoj). Naturamika sekcio por someraj migradoj estas kreota. Klubo por perfektigo de l' kurslernintoj en parolado havos kunvenojn en kafejo 66, str. Traversière (angulo str. Charenton), XII. ĉiumarde je 21-a h. La kursoj de l' vintro ne estis multnombre vizitataj. Restas tamen ioma kvanto da finlernantoj. Lastjare aliĝis al la grupo 23 novaj membroj. — *HISPANIO.* Lastatempe esp-o progresas en *Madrido* tre rimarkeble. Varbparoladojn oni aranĝis, krom en popoldomo, ĉe div. organizoj. Post la hisp. lingvo esp-o estas la plej parolata en la kafejo de la popoldomo. En fame-konata "Muzeo del Prado" jam oni komencis aranĝi gvidadon per klarigo

de l' bildoj en esp-o. Ĉar en tiaj klarigoj partoprenis eksterl. esp-istoj, la intereso de l' ceteraj hisp. k poliglotaj vizitantoj estis vekata. (Carlos, 6876.)

ĈE LA NEŬTRALULOJ

Kiom fidinde!

En la februara n-o de "Esperanto" de UEA s-ro Edm. P. instruas siajn legantojn pri la signifo de *alies*. Samtempe li diras: "krom *alio* ni vidis jam foje *aliu, aliam, alial* sed neniam *aliel* . . ."

Sendube s-ro Edm P. ne legas "S-ulo"n nek ian SAT-eldonaĵon. Jam de pluraj jaroj *aliel* estas ja ofte uzata anstataŭ la longa k peza formo *alimaniere*. Plie tiu neologismo k. s., kiuj tute nature k logike kompletigas la genie elpensitan tabelon de Zamenhof, troviĝas en la pola vortaro antaŭ nelonge eldonita de "Laboro-Praca" en Varsovio.

La uzo de *aliel* estas cetere ne malpli facile pravigebla ol *alies*, kiun uzas s-ro Edm. P. Sed, ĉar li neniam uzis *aliel*, tio verŝajne signifas, ke liaopinie neniu kuraĝus tion fari sen lia permeso.

Kiom fidinda homo! . . .

*

La unua parolanta filmo en esp-o, triminuta dialogo kun saluto al la tutmonda esp-istaro, produktita de "Paramount" (Peremont) en Novjorko, kun speciala por-eksterlanda destino, estas dissendita en 16 div. landojn. La firmo anoncas, ke oni atente studos la sukceson de la filmo en fremdaj landoj.

*

En Grekio esp-o estas de nun instruata ne nur en la Instruistaj Institutoj de unuagrada k mezgrada instruado de Ateno k Pireo, sed krome en ĉiuj gimnazioj de la lando, en lokoj, kie troviĝas personoj taŭgaj por instrui. Bedaŭrinde tiaj personoj ne ekzistas en sufiĉa nombro (sume 100 p. estas rajtigitaj). En Ateno 15 kursoj kun ĉ. 800 gelernantoj (inter ili multaj gimnazianoj, studentoj, instruistoj k instruist-kandidatoj).

*

La Brita Esp. Asocio organizos ĉijare por siaj anoj tri libertemp-vojaĝojn, unu al Nordfrancio, duan al Belgia marbordo, trian al Como en Italio, dum diversaj monatoj.

*

En Katrineholm k Vingaker (Svedio) okazis kursoj laŭ Ĉe-metodo kun 140 p.; lektoro H. Seppik. Kursfina festo kun publika ekzameno en granda teatra salono de Katrineholm. Al individua ekzameno anonciĝis 80 kursanoj. H. Seppik instruas nun en Eskilstuna kun 350 p. Kvar eksterlandanoj instruas dume en Svedio laŭ rekta metodo.

KUN TIU ĈI NUMERO ESTAS EKSPEDATA "LA NOVA EPOKO"

S-ro Tib. Morariu memorigas en "Heroldo" pri la sukcesoj atingitaj per la Ĉe-metodo en Svedio k aliaj landoj; li sciigas, ke du junaj svedaj popollernejaj instruistoj preparas sin por instrui tra la mondo (komencante en Estonio k Hungario) esp-on laŭ tiu sama metodo. Li alvokas krei "Ĉe-Institutojn" por racie interŝanĝi diversnaciajn instruistojn k fondi interkorespondajn centrojn.

*

Por plialtigi sian abonant-nombron k ebligi samtempe al sovetiaj esp-istoj legi "Heroldon" (kio pro neeblo transsendi monon el Sovetio ĝis nun ne okazis), tiu entrepreno metas instigon antaŭ siajn legantojn: kolekti la necesan monon kiel "Jubilean Donon" pro dekjara ekzisto. La kolektotaj sumoj servus por liveri senpage "Heroldon" al Sovetio, kie oni tre sopiras la gazeton, asertas la redaktoro.

*

La Lyon-a Internacia Foiro (3. ĝis 16. marto 1930) eldonis bele prezentitan 16-paĝan broŝuron kun multaj ilustroj, urbplano k klarigaj tekstoj en esperanto. Jen, kiel la komerco scias utiligi por si nian lingvon.

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

En okcidento nenio nova, de Erich Maria Remarque (elp.: Erik Maria Remark). Eld.: Heroldo de Esperanto, Köln. Form.: 21×15 cm. 252 pĝ. Prezo: 5 mk. g. broŝurita, 7 mk. g. bindita.

Ĉi tiu verko estas jam tradukita en 19 lingvojn; ni tamen bonvenigu la esperantan tradukon, kiu ĝenerale estas taŭge farita, kvankam ĉeestas vortoj, kiujn mi povis trovi nur en unu (estona) vortaro, ankaŭ kelkaj nekompreneblaj esprimoj, kiel "fermŝutita koro", krom malĝusta uzo de "kazo" anstataŭ "okazo".

La aŭtoro rakontas siajn milit-spertojn tre interese k vivplene. Kvazaŭ kompromitanta infano, li sciigas ĉion, eĉ tute krude pri plej maldelikataj okazintaĵoj (tamen ĉu *io* povus esti pli maldeca ol batalkampo post bombardo?). Li estis ĵetata kun kunuloj de la lernejo en la militon, en kiu: ". . . ĉiu vivesprimo devas nur servi al la vivkonservado", ". . . ni scipovas kartludi, blasfemi k militi", ". . . polurita butono estas pli grava ol . . . Schopenhauer". Ili trovis nuligata la tutan antaŭan vivon, antaŭtempe maljuniĝis, samtempe sovaĝiĝis. La nura bono estis kamaradeco; tiuj junuloj patrumis teruritajn nov-rekrutojn kaj por ili pli terura estis la blekego de vundita ĉevalaro, ol krioj de homoj. Kial? Ĉar la ĉevaloj k nove-venintaj knaboj estis plej senkulpaj pri la milito. Oni admiru la bonkorecon, sed konstatu, ke tian kamaradecon oni povas trovi ankaŭ en minejo aŭ rikoltkampo; ne necesas forbruligi domon por rosti porkon. La kuraĝego de tiuj junaj soldatoj forperdiĝis por malinda celo; ili lernis ruzi, anstataŭ ribeli. Eĉ en la lasta periodo, kiam mankis manĝaĵo, vestoj, municio . . . ankoraŭ ili fatale akceptis sian sorton.

Ĉu Remark apartenas nin? Almenaŭ parte; li verkis libron, kiu vekas ĉe la leganto kontraŭ-milit- k religiemon. Kvankam li ĉefe kontrastigis la sorton de siaj *samaĝanoj* kun tiu de pli aĝaj militantoj, tamen oni trovas ĉe li ankaŭ klaskonscion, eĉ ian minacon: ". . . tiam leviĝos niaj mortintaj kamaradoj . . . k tiel ni marŝos . . . la jaroj de l' fronto post ni — . . . kontraŭ kiu?" Sed li ne vidigas la aglan vizion de Barbus en "La Fajro", nek la tujan post-militan agadon de tiu lasta (ĉu ne pasis 11 jaroj, antaŭ ol Remark parolas?). Oni nur povas esperi, ke lia subita riĉiĝo per ĉi tiu verko ne tute forviŝos de li la memoron pri tio, kio konsistigas ĝian enhavon. *E. K. L.*

UKRAINIAJ SAT-ANOJ!

Refoje ni atentigas, ke SAT-kotizoj k abonpago devas esti sendataj *nur* al CK SEU (Spiridonovka, 15, *Moskvo*). De aŭgusto 1929 en *Kremenĉug* ekzistas nenia esp. agentejo. La esp. libroekspedejo akceptas *nur* libromendojn. *UK de SEU, Ĥarkov.*

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

Uusi Kotimaa, New York Mills, USA, 31. 12. 29, Ĉu la Ligo de Nac. konsistigas ion novan? *Kansan Lehti*, Tampere, 2. 1., Elmigrado (trad. 14 142); *L' Effort*, Lyon, 8. 2., Meksikio (277), Prol. sano (277), Siriuso (277).

Represis el "La Lernanto":

L' Effort, Lyon, 8. 2., Morto de Afriĉjo (jan.).

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Kansan Lehti, Tampere, 4. 1. (pri SAT), 8. 1., 9. 1.; *Daily Worker*, London, 14. 2. (rubriko); *La Dépêche Dauphinoise*, Grenoble, 8. 2.; *La Revista Blanca*, Barcelono, 15. 2.; *L' Effort*, Lyon, 8.2.; *Signalen*, Stokh., 13.2.

Peresper. materialon enpresis:

Kansan Lehti, Tampere, 11. 1. (2 art.), 18. 1., 3. 2., 4. 2.; *L' Effort*, Lyon, 8. 2.; *L' Ecole Emancipée*, Saumur, 16. 2. (krome noto pri instruistaj artik. en "S-ulo").

NIA POŜTO

14 157. — Por ekscii pri la sorto de via unua artikolo, vi turnu vin al la Red. de la *Liberpensula Paĝo*. Ĉe la fino de via dua artikolo vi instigas la leguntojn, ke ili traduku ĝin nacilingven; ni konsilas, ke vi mem faru tion k provu aperigi ĝin en germ. gazetoj. *E. L.*

3409. — Viaj versoj aperos eble en "L. L.". La "Tago" nur laŭ sia vico.

14 103. — Jes, aperos.

10 504. — Ni intencas uzi en "S-ulo" (felietone).

14 399. — Via rakonto tro similas al ŝerco, kiun ni jam aperigis en "L. L.". Sekve ni ne uzos. Eble vi trovos ion alian. *Red.*

10 080. — Se vi povas varbi novan membron, retenu ĝin, aliel vi resendu ĝin al ni.

14 404. — Via let. estas tute ne komprenebla.

Al multaj. — Ĉiuspecajn pagojn ni ricevis el div. landoj, el Sovetio la plej multajn, sed neniu informis nin pri la celo de la pago. *Adm.*

KORESPONDADO

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0.80 mk. g., ĉiu plia linio 0.50 mk. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago. L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl. = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo. Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

AŬSTRIO

K-do Hausleitner Jakob, B. B. Werkst., *St. Pölten*, interŝ. precipe PM, krom Germanio. Resp. garantiata.

BELGIO

K-do E. Klein, rue du Damier 3, *Bruxelles*, kun Ameriko pri ĉ. temoj. Resp. garantiata.

ĈEĤOSLOVAKIO

— Tri K-doj serĉas koresp-adon kĉl pri ĉ. temoj, L, PI, Resp. garantiata. Adr.: K-do Rudolf Leutelt, *Dönis 67 b. Grottau a. N.*

FRANCIO

K-do André Gaston Provost, 5 rue Houdart, *Paris-20*, PM, bfl k stenografio.

GERMANIO

K-do P. Köster (20 j. sportulo), Karlstr. 34, *Rostock*, kĉl. Gek-doj, PK, PI.

K-do H. Schubert, *Spielberg 37*, Post Marktleuthen/Oberfranken, kĉl, L, PK, PI.

K-do Ernst Georgi, Hotel Adolf, *Merkstein b. Aachen*, serĉas seriozajn gekoresp-antojn en Belgio, Francio, Hispanio, Britio k Sovetio pri div. temoj. Mi dez. geŝakludantojn por malproksimŝako. Resp. gar.

K-do Gerhard Nokiel, *Erdmannsdorf i./R.*, n-o 44, serioze interŝ. PM, kĉl.

— Kursanoj de Lab. Klubo serĉas eksterl. koresp-adon, PI, bfl. Skribu al kursestro K-do Friedrich Giefer, Eintrachtstr. 23, *Mayen i. Rhld.*

JUGOSLAVIO

K-dino Ana Gutmann, *Ĉakovec*, koresp. kĉl, PI, bfl.

SOVETIO

— Scienca Kabineto de Geologia k Mineralogio interŝ. sperton k ekspozaĵojn. Adr.: Ukrainio, *Kremenĉug*, Pedagogia Teknikumo.

JARABONO
por membroj . . . 8 mk. g.
por nemembroj . . 9 mk. g.
Ankaŭ ¼-jare abonebla!

— Scienca Kabineto de Terkulturo k Kamparana Mastrumado interŝ. sperton k ekspozaĵojn kĉl. Adr.: Ukrainio, *Kremenĉug*, Pedagogia Teknikumo.

K-do Suren Miĥajlov, ul. Ŝio-Ĉitadze, 6, *Tiflis*, kĉl L, PK, PI, esp-aĵo pri moroj, vivkondiĉoj, div. movadoj. Resp. gar.

K-dino Elena Arakeljan, ul. I-a Gnuni, 38, *Erivan*, kĉl L, PK, PI, esp-aĵo pri artoj, moroj ktp. Resp. gar.

K-do B. Esperkoro, Raboĉaja 39, *Samara*, interŝ. klasbatal. L, PI, afiŝojn ktp. kĉl pri IRH, socia vivo, radio.

— Gelernantaro koresp. kĉl pri ĉ. temoj. Nepre resp. Adr.: *Barnaul*, Siberio, 6-a Sovet-lernejo.

— 14-jara pioniro de Sovetia lernejo — Samiel Bregman — kor. kĉl, gepioniroj pri lernejaj aferoj. Skribu baldaŭ, mi atendas, *Tiflis*, Milicejskaja, 2.

K-do Zahornij (junkom.), st. *Nijne-Dneprovsk*, Raj-Kom. Komsomola, kĉl, ankaŭ kolektive. Resp. garantiata.

Adresŝanĝo. — K-do Isaak Bulba, Gospitalnaja-str. 23/16, *Odeso*, pri politikaj, ekonomiaj, sciencaj, sociaj ktp. temoj, PI, il. gaz., afiŝojn, fotojn ktp. kĉl. Resp. garantiata.

K-do Al. Ŝiring (studento-elektristo), Sadovaja 17/15, *Odeso*, pri radio, tekniko, literaturo, fotado, PM, PK, gaz., fotojn.

K-dino Anjo Bulba (20 j.), Zaporoĵskaja 16/5, *Odeso*, kĉl pri muziko, kantado k. a. temoj, PK, gaz. ktp. Resp. garantiata.

— 20 instruistoj koresp. kĉl, L, PK. Resp. gar. Adr.: Ukrainio, *Kremenĉug*, Domo de Klerigado, BRO.

— 100 gelernantoj interŝ. L, PK, kĉl. Adr.: Ukrainio, *Kremenĉug*, 9-a Laborlernejo, Gogolstr.

— Viglan koresp-adon garantias 150 gestudentoj pri ĉ. temoj, kĉl. Adr.: Ukrainio, *Kremenĉug*, Pedagogia Teknikumo.

K-do 13 706 (radiotelegrafisto) kies artikolo "La spertoj de radio-telegrafisto" estis presita en "S-ulo" 274, estas petata skribi sian adr. por koresp-ado pri profesiaj temoj. Adr.: Radioteknikisto A. Syromjatnikov (8585), Worowskijstr. 5, *Samarkand.*

Atentu, Infanamikoj!

Grupo de infanamikoj serĉas korespondantojn en ĉ. landoj, L, PI. Sendu amase! Respondon garantias: K-do Wilhelm Frenzel, *Seifhennersdorf Nr. 461* (Saksio, Germanio).

Fabrikaj komjunula k IRH-ĉeloj, pionir-taĉmentoj k laborista klubo dez. koresp. kun la samaj organizoj alilandaj. Adr.: USSR, *Keret*, Karelio, L/u, N. 42, P. Jasinski.

La 14-an de marto 1930 okazos

POŜTKARTVESPERO

de la esp.-kurso en Frövi (Svedio). La kursanoj petas, sendi leterojn k poŝtkartojn ilustritajn. Respondo garantiata. Adr.: K-do Paul Limnell, *Vanneboda*, (Svedio).

Ni atendas viajn korespondajojn!

Por la kursoj esp-aj, kiuj komencis sian laboron aŭtune 1929. Niaj lernantoj, 10 personoj, estas precipe plenaĝaj — gemuzikistoj k artistoj. Nin interesas ĉiuj temoj! Nia adr.: Dvorec Truda, Moskovskaja, *Stalingrad*, USSR, Okrotdel sojuza "Rabis".

4-a Distrikta Barnaula MOPR-Konferenco

sendas flaman saluton al polit. enkarcerigitoj de kapitalistaj landoj kaj alvokas ĉiujn MOPR(IRH)-organizojn por helpo al la polit. enkarcerigitoj kaj iliaj familioj. Ni atendas revokon por komuna laboro k interkorespondado.

Vivu internacia proleta solidareco!

La Prezidantaro.

USSR, *Barnaul*, Okruj kom MOPR.

EKSTREM-ORIENTA MILIT-ŜIPARO

de Aparta Ekstr.-Orienta Ruĝstandarda Armeo

dez. koresp. kun laboristaj, maristaj, kompartiaj k aliaj organizoj de la tuta mondo k kun ĉiu laboristo, maristo, kompartiano, militisto pri ĉiuj temoj. Ankaŭ deziras ekspoziciaĵojn PI L, gaz., jurn. ktp. kontraŭ resendaĵo.

Adreso

USSR, ĤABAROVSK, Poŝtkesto 41, K-do Verŝinin A. J.

ENHAVO:

	paĝo
Londono	257—258
La renversiĝo de l'diktatoreco en Hispanio	258
La raciigita aŭtomobilfabriko (Opel)	258—259
Socia vivo en Aŭstrio	259—260
Pri laboristaj salajroj kaj militelspezoj en Ĉeĥoslovakio	260
La urbo Berdiĉev — simbolo de hebrea "bohemvivo"	260—261
Kulturtaskoj	260—261
Tago el mia vivo	261—262
Diskutejo	262
Esperanto-Servo	263
Sennacieca Scienc-Kultura Paĝo	264—265
Tra Esperantio	265—268
Korespondado, Anoncoj	268

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)